



V. N. Devjatnin.

Artista biblioteko internacia.

---

№ I.

# I. La instruita mimikisto

(Originala komedieto en unu akto).

---

# II. LA FRENEZULO

(Sceno—monologo laŭ Gogol).

---

# III. UNIFORMO

(Vodevilo en unu akto de A. P. Karatigin).

---

MOSKVO—1910.

Eldono de L. N. Ĥolĉev.

Presejo de L. N. Ĥolĉev, Moskvo, Tverskoj bul.,  
domo № 105.

## Antaŭparolo.

Unu el la plej bonaj rimedoj por propagando de «Esperanto» estas teatraj prezentadoj de diversaj dramaj artproduktoj, ĉar en teatro rigardantoj per la propraj okuloj kaj oreloj efektive konvinkigas, kiel fleksebla viva, praktika kaj bonsona estas nia kara lingvo.

Bedaŭrinde nia artista biblioteko esperanta estas dume tro malriĉa, kaj niaj gesamideanoj, intencante aranĝi ian spektaklon esperantan, ĉiam devas serĉi iajn piecojn, kaj, tute ne havante elekton, prenas tion, kio jam ekzistas, aŭ devas ili mem verki aŭ traduki iun komedieton al difinita tago.

Kompreneble verki ne estas ĉiam ebla, kaj pro tio oni iafoje prenas ian piecon, kiu eĉ ne plaĉas, aŭ ne estas taŭga por scenejo.

Do ni decidis fondi konstantan eldonadon de l' «Artista biblioteko internacia», kaj nun prezentas al niaj favoraj gelegantoj—samideanoj la unuan, provan numeron de tiu-ĉi biblioteko.

En tiu-ĉi libreto la gelegantoj trovos tri jam konataj al ili piecoj, ĉar ili estis jam presitaj en №№ 10, 11 kaj 12 de »La ondo de Esperanto« por pasinta jaro, kaj en №№ 1 kaj 2 de ĉi-tiu jaro,—kaj, krom tio, ili estis plenumitaj dum niaj Moskvaj esperantaj spektakloj: la unua (La instru-ita mimikisto) la 2-an de Decembro de pasinta

jaro kaj la du lastaj («La frenezulo» kaj «Uniformo») la 29-an de l' sama monato.

Ni intencas daŭrigi la eldonadon de nia «Artista biblioteko», kaj ni jam havas la materialon por tri sekvontaj libroj, en kiuj estos presitaj tri kvinaktaj tragedioj el la trilogio de A. Tolstoj («Morto de Iohano Minaca», «Reĝo Teodoro Johanniĉ» kaj «Reĝo Boriso»), antaŭ nelonge de mi tradukitaj kaj tute pretaj por presado.

Se iu el niaj samideanoj deziras partopreni en eldonado de sekvontaj libroj de nia biblioteko, tiu bonvolu sin turni al ni kaj sendi sian parton de eldonmono (dek rublojn), kaj en tiu akazo post eldono de libro li ricevos sian monon kun aldono de parto da tuta pura profito, kiun ni ricevos de tiu-ĉi eldono.

La nomoj de partoprenantoj en la eldonado estos presataj sur la kovriloj de l' libroj kune kun raporto pri tio, kioman sumon da profito ricevis ĉiu el partoprenintoj en la antaŭestinta eldono.

En unuiĝo estas forto, kaj tial ni esperas, kun helpo de niaj amikoj samideanoj, starigi nian aferon pli firme, al ĝi staras nun.

V. Devjatnin.

# La instruita mimikisto.

Komedieto en unu akto.

Instruita alilanda mimikisto.

Juna rusa bienhavanto.

Lia veturigisto.

Servanto.

Kelkaj ĉeestantoj.

*(La scenejo prezentas ĝardenon ĉe restoracio).*

## Sceno I.

Mimikisto kun bienhavanto sidas ĉe la tablo kaj trinkas bieron.

Mimikisto. Ne, sinjoro,, mi ne konsentas kun vi: Esperanto neniam estos efektive internacia lingvo,—kaj tute vane vi predikas ĝin!

Bienhavanto. Sed kial?

Mimikisto. Kial... Tio-ĉi estos malfacile al vi klarigi, tiom pli, ke vi estas tiel varmega esperantisto.

Bienhavanto. Stranga homo vi estas! Sed ĝi jam nun estas internacia!..

Mimikisto. Kiamaniere?

Bienhavanto Ĉar esperante parolas jam milionoj da homoj, de plej diversaj nacioj en plej diversaj landoj de l' tuta mondo, ĉar esperanta literaturo...

Mimikisto. Lasu almenaŭ literaturon, sinjoro!.. Ne por ĉiuj ja ĝi estas atingebla, kaj ne ĉiuj!..

Bienhavanto. Permesu, sinjoro...

Mimikisto Ne,—permesu vi!.. Kiamaniere vi parolos en via mirinda Esperanto ekzemple kun surdemutuloj?.. jen por kiu estas necesa lingvo internacia!..

Bienhavanto. Sed kun ili en nenia lingvo oni povas paroli!..

Mimikisto Pardonu, sinjoro, se vi ne povas kun ili interparoli, el tio-ĉi ankoraŭ ne sekvas, ke ankaŭ la aliaj ne povas. Por ili (aparte por ili), devas esti lingvo, kaj ĝi jam estas!

Bienhavanto. Tre interesel do kia?

Mimikisto. Kaj vi kuraĝas vin nomi propagandisto de lingvo internacia?! Hontu, sinjoro,—se vi ne scias ĝis nun efektive internacian lingvon!

Bienhavanto. Sed pri kio vi parolas?

Mimikisto. Pri la mimiko, sinjoro!..

Bienhavanto. Pri la mimiko?!

Mimikisto. Jes, pri la mimiko! Jen estas efektive internacia lingvo, kun kies helpo vi povas paroli kun ĉiuj homoj! Sed bedaŭrinde tiu-ĉi scienco ekzistas nur embrie.

Bienhavanto. (malestime). Nu... Ĉu ĝi estas scienco?!

Mimikisto. Sendube, kaj mi (li sin levigas) estas la reprezentanto de tiu-ĉi scienco, al viaj servoj!..

Bienhavanto. Ĥa, ĥa, ĥa!.. Pardonu, sinjoro,—ĝi ne estos komparo,—sed mi nevole ekmemoris alian reprezentanton de tiu-ĉi scienco... ĥa, ĥa, ĥa... mian veturigiston...

Mimikisto. (serioze kaj ofendite). Vi povas ridi, kiom vi volas, sed la scienco, tamen, de tio-ĉi nenion perdos!..

Bienhavanto. (kun malbone kaŝata rideto).

Mi petas ankoraŭ unu fojon pardonon, estimata mia sinjoro,—sed per tiu-ĉi fikomparo mi volas nur diri, ke vian internacian scienccon—mimikon—ni tute ne bezonas ellernadi, ĉar kun tiu-ĉi scienco, aŭ pli ĝuste—arto, oni povas tre facile konatigi simple per praktikado dum kelka tempo...

Mimikisto. El tio-ĉi mi povas nur konkludi, ke vi tute ne komprenas la esencon de tiu-ĉi scienco,—scienco, sed ne arto.

Bienhavanto. Je Dio, vi tre interesigas min per via nova scienco. Tamen mi estas konvinkita, ke mia veturigisto bonege konas vian scienccon...

Mimikisto. Kion vi diras, sinjoro?! kiamaniere li povas ĝin koni?

Bienhavanto. Vidu, sinjoro,—li havas unu fraton kaj du fratinojn, kiuj estas surde-mutaj de naskiĝo mem, kaj li tiamaniere praktike konatigis kun via, kiel al vi plaĉas diri, scienco...

Mimikisto. Ĥa, ĥa, ĥa,—pardonu, sinjoro, sed vi parolas sensencaĵojn!.. Ĉu ĝi estas scienco!? Ĉu via veturigisto povas paroli kun mi per la mimiko pri iaj abstraktaj objektoj, kiel, ekzemple, ni interparolas?!

Bienhavanto. Li parolos, kiĉon vi volas!.. Mi vetas!

Mimikisto. (sin levante). Bone, mi konsentas veti,—kaj jen estas miaj kondiĉoj: se via veturigisto, efektive, kun mi interparolos, mi pagos al li 300 rublojn, kaj vin mi regalos je ĉampanvino! Ĉu konsentite?

Bienhavanto. (donas al li manon). Jes, kun plezuro, kaj mi tuj mendos la ĉampanvinon, por kiu pagos nepre vi!

Bienhavanto. (sin levante). Ni vidu!.. Tuj mi venigos mian instruitan mimikiston! Nur vi, sinjoro, bonvolu hipokriti, ke vi estas surde-muta. (Li foriras kaj post kelka tempo revenas kune kun la veturigisto).



Sceno II.

Bienhavanto. (al veturigisto). Jen, mia kara, tiu-ĉi sinjoro estas surde-muta kaj li volas interparoli kun vi per la mimiko...

Veturigisto (kun miro). Sed kion ĝi signifas «per la mimiko?» (Mimikisto ĉe tiu-ĉi demando ridas).

Bienhavanto. (iom konfuzita kaj kolere). Tio-ĉi signifas... per la diversaj signoj de l'manoj... aŭ...

Veturigisto. Ha, mi komprenas!.. Bone...

Bienhavanto. Se vi povos interparoli kun la sinjoro, li pagos al vitricent rublojn, kaj se ne...

Veturigisto. Bone, bonege!.. Mi povos... Nu, sinjoro! (Li svingas per la mano al la mimikisto. Tiu-ĉi, ridante, sin levas kaj iras al la antaŭstaranta tablo).

Bienhavanto (al veturigisto). Sed vi devas interparoli tute senvorte, nur per signoj...

Veturigisto Bone, bone! Mi komprenas!..

(Muta sceno: la mimikisto kaj la veturigisto sidigas unu antaŭ la alia post la tablo. La ĉeestantoj sidigas kontraŭe, kaj komenciĝas muta interparolo per la mimiko. La mimikisto montras al la veturigisto unu fingron; tiu tuj mem montras du fingrojn. Konfuzo. Mimikisto montras la manplaton, tiu al li—la pugnon. Mimikisto sin levas, tute mirigita, kaj iom pripensinte, montras al la veturigisto supren kaj malsupren, kaj tiu-ĉi lasta faras signon per manoj, kvazaŭ li viŝas la plankon. La mimikisto estas tute konfuzita. Li elprenas la monujon kaj pagas al la veturigisto 300 rublojn).

Mimikisto. Mi malgajnis!.. (al la servanto): Donu la ĉampanvinon! (Li viŝas la ŝviton de sur la frunto).

Veturigisto. (kaŝante la monon en la po-

ŝon, kun miro) Sed vi ja bone parolas vorte, via sinjora moŝto?! Do por kio vi pagis?

Ĉeestantoj. Estas mirinde!.. Kion ĝi signifas?

Bienhavanto. Pri kio ili parolis? Estas tre interese!.. Pardonu, gesinjoroj, komence ni devas forigi mian veturigiston, ke li ne aŭdu la klarigojn de la sinjoro, kaj poste ni lin ree alvokos kaj aŭskultos, kion li al ni klarigos. (Al la veturigisto). Vi foriru! Vi venos, kiam mi vin alvokos. (La veturigisto, kunpremante la ŝultrojn kaj ridetante, foriras. La mimikisto stariĝas antaŭ la ĉeestantoj).

Mimikisto. Unue, estimataj gesinjoroj, mi devas konstati la fakton, ke la rusoj estas mirinde kapablaj! Vidu, tiu-ĉi simpla neklera homo, tiu-ĉi veturigisto... Ĉu vi povus imagi, ke li estas konata kun tielaj sciencoj, kiel la mimiko, la teologio, la politiko...

Ĉeestantoj. Sed pri kio vi interparolis? Klarigu! Ja tio-ĉi estas tre interesa!

Mimikisto. Tuj, tuj, gesinjoroj, mi ĉion al vi klarigos... Vidu, komence, ĉar mi devis paroli per la mimiko kun la tute neklera homo, mi decidis tuj mem meti lin en la embarason: mi prenis la teologian temon, pri kiu—mi opiniis—li nenion povus paroli ne sole per la mimiko, sed eĉ per vortoj... Montrinte al li unu fingron, mi diris al li per tiu-ĉi signo, ke Dio estas sola, unika. Kaj li tuj mem daŭrigis tiun ĉi mian penson, kaj montrinte al mi du apudajn fingrojn, li diris per tiu-ĉi signo, ke jes, Dio estas nur unu, sed li haŭas en si du nedivideblajn ekzistaĵojn: la Dian kaj la homan!.. Ĉu ne mirinde? Mi tamen pensis, ke eble li tute okaze faris al mi tiun-ĉi dufingran signon, nur tial, ke mi montris al li unu fingron. Tiam mi forlasis la teologion, kaj komencis paroli pri la politika temo: mi montris al li la manplaton, dezirante per tiu-ĉi signo esprimi la penson, ke Rusujo estas grandega regno. Kaj imagu: li

tuj komprenis mian penson kaj eĉ plenigis ĝin: li diris al mi, ke Rusujo estas efektive grandega regno, subigita al aŭtokrata potenco de unu reĝo, kaj montris al mi simbolon de tiu-ĉi aŭtokrata potenco—la pugnon, t. e. sceptron.

Ĉeestantoj. Ja tio-ĉi estas mirinda!

Mimikisto. Jes, tre mirinda! Jam en tiu-ĉi momento mi konfesus min venkite, sed mi volis fari ankoraŭ unu provon: mi ree returnis min al la teologia temo, kaj montrinte al mia kunparolanto supren kaj malsupren, mi diris al li per tiu-ĉi signo, ke Dio estas sur la ĉielo kaj sur la tero... Kaj, al mia senfina mirego, li ree tuj mem komprenis min, kaj montris al mi la signon (li faras per la manoj la movojn de l'veturigisto), per kiu li ĝuste diris al mi, ke Dio estas ĉie!! Kaj jen mi solene konfesas min venkite!..

Bienhavanto (al la publiko). Kion ĝi povas signifi? Ĉu efektive mia veturigisto estas tiel saĝa, tiel klera?! Mirindega okazoll.

Ĉeestantoj. Sinjoro, bonvolu do venigi vian veturigiston!.. Tre interese, kion li klarigos...

Mimikisto. Nu, sendube, tion saman, kion klarigis mi!.. Ĉar ni bone komprenis unu la alian...

Bienhavanto. Tuj mi kontentigos vian scivolecon, miaj estimataj gesinjoroj! (Al la servanto). Alvoku mian veturigiston.

Servanto Tuj, via sinjora moŝto! (Li eliras).

Bienhavanto (al la mimikisto). Kaj vin, sinjoro, mi petas, bonvolu esti ankoraŭ por kelka tempo surde-muta.

Mimikisto. Bone, bone, kun plezuro.

### Sceno III.

Veturigisto (enirante). Kion vi bonvolas, mia sinjoro?

Bienhavanto. Nu, klarigu al ni, mia kara, pri kio vi interparolis kun la sinjoro?

Veturigisto (kun rideto). Ĉu vi ne komprenis? Strange! Mi ja parolis tute internacie!..

Ĉeestantoj. Ni nenion komprenis! Klarigu, klarigu.

Veturigisto (ĉiam ridetante). Nu, bone, se vi efektive ne komprenis, mi kun plezuro al vi klarigos (li faras kelkajn paŝojn antaŭen). Vidu, tiu-ĉi sinjoraĉo, videble, ofendiĝis, ke mi, ia veturigisto, kuraĝis paroli kun li internacie, tial li, sidiginte al la tablo, diris al mi, ke li elpikos al mi la okulon... (Ĉeestantoj ridas, mimikisto konfuziĝas) kaj li montris al mi la fingron. Kaj mi respondis al li, ke en tiu-ĉi okazo mi elpikos al li ambaŭ okulojn... Li por tio ekkoleris ankoraŭ pli forte, kaj montris al mi la manplaton, dezirante per tio-ĉi diri al mi, ke li donos al mi survanĝon!..

Ĉeestantoj (ridante). Brave! brave!.. Kaj vi?

Veturigisto. Kaj mi montris al li la signon (li montras la pugnon), kiu, ŝajne, bezonas neniajn klarigojn!..

Ĉeestantoj (ankoraŭ pli ridante). Bonega li estas! Jen efektive la mimikisto!.. (Mimikisto en tiu-ĉi momento, tute konfuzita, nerimarkeble eliras).

Bienhavanto. (kun rido). Nu, klarigu plu!..

Veturigisto. Kion do ankoraŭ? Ha, jes... Poste mia bedaŭrinda sinjoraĉo tute koleriĝis kaj montris al mi supren kaj malsupren, volante per tio-ĉi diri, ke li kaptos min je la haroj, suprenlevos kaj ĵetos min sur la teron.. Sed mi ne ektimis liajn minacojn kaj respondis al li, ke mi ankoraŭ kaptos lin je la haroj kaj trenos lin, ĝis kiam li ne petos pardonon!.. Ŝajne mi parolis sufiĉe klare...

Ĉeestantoj. Tre klare!.. Brave, brave, mimikisto! (ĉiuj ridaskaj aplaŭdas).

Bienhavanto. (sin tŭrnante) Sed kie es-



tas nia efektiva mimikisto!.. Ĥa, ĥa, ĥa! Li for-  
kuris, malaperis, kiel ĉiuj kontraŭuloj de Esperan-  
to! Eĉ en tio-ĉi Esperanto venkis! Vivu Esperanto  
kaj ĝia genia kreinto!!

Ĉeestantoj. Vivu Esperanto!

Veturigisto. (ĵetante supren sian ĉapon).  
Jes, vivu Esperanto, ĉar dank'al ĝi mi por nenio  
ricevis tricent rublojn.

Ĉeestantoj. Brave! brave! Vivu Espe-  
ranto!..

(Kurteno falas).

# La frenezulo.

(Laŭ Gogol).

Sceno-monologo.

(La scenejo prezentas malgrandan ĉambreton en malsanulejo. Preskaŭ meze staras la lito, ĉe kies kaploko estas pendigita nigra tabulo kun latina snrskribo. Sur la lito sidas frenezulo, stariginte la kubutojn sur la genuojn kaj kovrinte la vizaĝon per la manoj. Dum kelka tempo—silento. La frenezulo forprenas la manojn, frotas sian frunton kaj kun miro rigardas ĉirkaŭen. Poste li malrapide sin levas kaj malrapide paŝas al la antaŭscenejo).

La frenezulo (kun mistera aspekto). Hodiaŭa tago estas la tago de plej grandega triumfo! En Hispanujo estas reĝo... Li troviĝis... (ĉirkaŭrigardinte, li rektiĝas kaj grave montrante sian bruston, diras): Tiu-ĉi reĝo estas mi!.. Jes, mi... (Kun gravega mieno li faras kelkajn paŝojn tra la scenejo). Mi nur hodiaŭ pri tio-ĉi sciigis. Kvazaŭ fulmo subite min lumigis!.. Mi tute ne komprenas, kiamaniere mi povis pensi kaj imagi, ke mi estas ia oficisto! Kiamaniere povis enrampi mian kapon tiu-ĉi sensenca, freneza penso?! (Kun timo). Bone, ke neniuj tiam ŝlosis min en la frenezulejon!.. (Paŭzo). Nun antaŭ mi jam ĉio estas malfermita! Nun mi vidas ĉion kvazaŭ sur la manplato!.. Sed antaŭe... (alpremas manon al la frunto) mi ne komprenas... ĉio estis antaŭ mi kvazaŭ en ia nebulo...

(mistere). Kaj tio-ĉi estas pro tio, mi opinias, ke homoj imagas, ke la homa cerbo troviĝas en la kapo; tute ne: ĝin alportas vento de Kaspia maro... Jes!.. jes!.. (Li sidiĝas sur la lito). Jes, nun mi jam ĉion bone memoras... Komence mi anoncis al mia kuiristino Mavro, kiu mi estas (li ree sin levigas)... Kiam ŝi ekaŭdis, ke antaŭ ŝi staras la hispana reĝo, ŝi eksvingis per la manoj kaj apenaŭ ne mortis de timo!.. (kun malestima kompato). Ŝi, malsaĝa, neniam ankoraŭ vidis hispanan reĝon!.. Mi, tamen, penis ŝin trankviligi, kaj per afablaj vortoj mi certigis ŝin en mia favoreco, kaj diris, ke mi tute ne koleras por tio, ke ŝi iafaje malbone purigis miajn botojn. Ŝi ja estas tute malklera virinaĉo: mi ne povas paroli al ŝi pri io la plej supra!.. Ŝi tiel ektimegis pro tio, ke ŝi kredas, ke ĉiuj reĝoj en Hispanujo estas similaj al kruelega Filipino... Sed mi komprenigis ŝin, ke inter mi kaj Filipino ekzistas preskaŭ nenia simileco... (Paŭzo, dum kiu li sidiĝas sur la lito). La oficejon mi hodiaŭ, kompreneble, ne vizitis... Diablo ĝin prenu! Ne, amikoj miaj, nun vi jam ne trompos min: mi ne volas transskribadi viajn abomenajn pape-rojn!.. (li leviĝas)... hodiaŭ... (ekmemorante). Jes, hodiaŭ... je la sesdek tria de... de Martobro... venis unu el niaj oficistoj kaj postulis, ke mi iru en la oficejon, ĉar jam pli ol tri semajnojn mi ne estis tie... Sed kiel strangaj estas tiuj-ĉi homoj: ili kalkulas tagojn laŭ semajnoj!.. Tion-ĉi ja la judoj enkondukis, ĉar ilia rabeno en tiu-ĉi tempo sin lavas... Nu, mi, tamen, pro ŝerco, ekiris en la oficejon. La estro pensis, ke mi salutos lin kaj komencos peti pardonon... Sed mi ekrigardis lin indiferente, ne tro kolere kaj ne tro favore, kaj mi sidiĝis sur mian lokon, kvazaŭ neniun rimarkante. Mi rigardis la tutan tiun-ĉi kancelarian kanajlaron kaj pensis: «Ho, se vi nur sciis, kiu sidas inter vi! Dio mia, kia tumulto fariĝus inter vi! Kaj la kancelariestro mem komencus min same saluti, kiel

li salutas nun ĉefdirektoron!.. (kun malestimo). Antaŭ mi oni metis iajn paperaĉojn, por ke mi faru el ili ian ekstrakton, sed mi eĉ per unu fingro ilin ne tuŝis... (Li promenas iom sur la scenejo kun kontenta rideto)...

Post kelkaj minutoj ĉiuj tumultigis: oni diris, ke iras la ĉefdirektoro. Multaj oficistoj ekkuris antaŭen, por montri sin antaŭ li, sed mi... nenium moveton! Kiam li trapasis nian fakon, ĉiuj butonumis siajn frakojn, sed mi... nenium moveton!.. Kia li estas direktoro?! Ke mi (puŝante kun granda indeco sian bruston) leviĝu antaŭ li?—neniam!.. Kia li estas direktoro?! (Silabe kaj signife)... Li estas... korko, sed ne ĉefdirektoro! Ordinara, simpla korko, kaj nenio plu... (montrante per la manoj). Jes, la plej simpla korko, per kiu oni ŝtopas la botelojn!.. (Post unu momento). Ĥa, ĥa, ĥa!.. Al mi pleje estis ridinde, kiam oni alŝovis al mi ian paperon, ke mi ĝin subskribu... Oni pensis, ke mi skribos sur fino mem de folio: «oficisto Popriŝĉin»... Vidu, kiaj!.. ĥa, ĥa, ĥa... Kaj mi sur plej videbla loko, kie subskribas la ĉefa direktoro, skribis per grandegaj literoj: «Ferdinando oka, la reĝo de Hispanujo!» Ĥa, ĥa, ĥa, ĥa!.. Se vi vidus, kia esti-mega silento fariĝis!.. (Grave). Sed mi eksvingis per la mano kaj diris: «Mi postulas neniajn signojn de subuleco!.. Kaj mi foriris... (Post kelkaj momentoj, promenante). De tie mi ekiris en la loĝejon de l'direktoro... (Subite haltante). Imagu, la malsaĝulo servanto ne volis min enlasi!.. Sed mi tiel lin ekrigardis kaj tiel diris, ke li eĉ la manojn mallevis... (Sekrete kun forta emocio). Senbare mi trairis rekte en ŝian ornamejon!.. Jes, ŝian, ŝian!.. Ŝi... sidis antaŭ la spegulo... ekvidinte min, ŝi rapide leviĝis kaj forsaltis de mi!.. Mi, tamen, ne diris al ŝi, ke mi estas hispana reĝo... Ne... Mi nur diris al ŝi, ke ŝin atendas tia feliĉo, tia feliĉo, kian ŝi eĉ imagi ne povas... Kaj ke, malgraŭ la intrigoj de niaj malamikoj, ni estos



kune, kune!! (Per tremanta voĉo). Kune! ku... ne!.. Mi nenion plu povis paroli kaj foriris!.. (Post kelka silento, per forta, malespera kaj kolera voĉo). Ho, tiu-ĉi malica, intrigema, ruza ekzistaĵo—virino!! Mi nur nune komprenis, kio estas virino!.. Ĝis nun neniu ankoraŭ sciis, kiun ŝi estas enamiĝinta. Mi unua tion-ĉi eltrovis... (Singardeme re-rigardante kaj alpremante la manon al la buŝo, sekrete). Ŝi estas enamiĝinta... la diablon... Jes, jes, tute serioze!.. La fizikistoj tute vane skribas, ke ŝi... ke ŝi amas... Ne, ne, sensencaĵoj!.. Ŝi amas sole nur diablon!.. (Montras per la fingro en la publikon, kun forta emocio). Jen, vidul.. en tiu vico... virino... ŝi rigardas tra binoklon!.. Ĉu vi vidas?.. Vi pensas, ke ŝi rigardas tiun-ĉi dikulon, kiu ĉi-tie sidas?! Tute ne!.. Ŝi rigardas la diablon, kiu staras post lia dorso... Jen, jen, rigardu: li kaŝis sin en lia surtuto... Jen li logas ŝin de tie per la fingro!.. Kaj ŝi nepre edziniĝos je li, nepre!.. Ho, virinoj, ho, fraŭlinoj!.. Diabla gento!! (Ree montrante per la fingro). Kaj jen tiuj-ĉi altrangaj iliaj patroj, jen ĉiuj tiuj-ĉi, kiuj sidas tie kaj tie, kiuj rampas, kvazaŭ serpentoj al reĝkortego kaj diras, ke ili estas patriotoj, la honestaj regnantoj... (Kolerege). La monon, la honoron deziregas tiuj-ĉi patriotoj! Patron, patrinon, mem Dion forvendas pro mono tiuj-ĉi honoramuloj, krist-perfidistoj!! Ha, tiu-ĉi honoramo!.. (Kun sekreta mieno). Tiu-ĉi honoramo elvenas de tio, ke sub la lango estas malgranda vezketo, en kiu sin kaŝas malgranda vermeto, kvazaŭ pingla kapeto... (Ankoraŭ pli sekrete) kaj preparas ĝin ia frizisto, kiu loĝas tie-ĉi, sur Pokrovka... Jes, jes, mi ne memoras nur, kiel oni lin nomas; sed estas ĝuste certe, ke li, kune kun ia akuŝistino, volas en la tuta mondo disvastigi la mahometan religion, kaj tial, oni parolas, en Francujo la plej granda parto da popolo jam alprenis la islamon... (Li sidiĝas sur la liton kaj enpensigas)...

...Sufiĉe longe mi vagadis hodiaŭ en la stratoj... l'reterveturis la regnestro... Ĉiuj formetis la ĉapojn, mi ankaŭ; tamen mi tute ne elmontris, ke mi estas hispana reĝo. Mi opiniis nekonvene elmontri min tuje, sur la strato... ĉar antaŭ ĉio oni devas min prezenti al la reĝkortego. Sed mi ne povis tion-ĉi fari, ĉar, ĝis nun mi ne havis nacian hispanan veston. Ha! Se mi povus trovi ian mantelon!.. Mi volis mendi ĝin al tajloro, sed tiuj-ĉi tajloroj estas ĝustaj azenoj... Al tio ili tute malpenas sian laboron, pensas ĉiam pri profitoj, kaj plejparte... ili pavimas la ŝtonojn sur la stratoj lial mi decidis fari la mantelon el mia nova uniformo, kiun mi metis sur min nur dufoje. Sed por ke tiuj-ĉi baŝtardoj ne povu ĝin difekti, mi mem decidis kudri, ferminte la pordon, por ke neniu vidu. Mi distrancis ĝin tutan per tondilo, ĉar la formo ja devas esti tute alia... (Paŭzo)... Kaj jen la mantelo estas tute preta... Mavro ekkriis de ravo, kiam mi ĝin vestis!.. (paŭzo). Tamen mi ne kuraĝas ankoraŭ min prezenti al la reĝkortego, ĉar ĝis nun ne venis ankoraŭ la deputataro el Hispanujo... Sen deputatoj estas ne konvene!.. Mi atendas ilin ĉiuminute... (sin levas, meditante). Min troege mirigas la malrapideco de l'deputatoj!.. Strange, tre strange! (promenante en medito kaj iafaje haltante). Kiaj kaŭzoj povus ilin haltigi?.. Ĉu efektive Francujo? (Kun ŝarĝa ekspiro)... Jes, ĝi estas la plej malbonfavora regno!.. Jes, malbone!.. Tuj mi estis en la poŝtejo, por informiĝi, ĉu ne venis la hispanaj deputatoj; sed poŝtestro estas neesprimeble malsaĝa, li nenion komprenas! Li respondis al mi, ke en la poŝtejo ne povas esti iaj hispanaj deputatoj!.. (Kunpremante la ŝultrojn). Nu, kion vi volas?.. Malsaĝulo!.. Li, ekzemple, diris, ke en la poŝtejo povas esti nur leteroj kaj diversaj sendaĵoj... Diablo lin prenu!.. Kio estas la letero! Ĝi estas bagatelo!.. Leteroj skribas nur apotekistoj, sed eĉ ili komence malsekigas la lan-



gon per vinagro, ĉar alie tuta vizaĝo estos kovrita per ulceroj... (Li sidiĝas kaj enpensiĝas)... (paŭzo).

(Sin levante kun gaja kaj kontenta mieno). Fine, mi estas en Hispanujo!.. Kaj tio-ĉi okazis tiel rapide, ke mi apenaŭ rimarkis!.. Hodiaŭ matene al mi aperis, fine, la deputatoj hispanaj, kaj mi kune kun ili sidiĝis en kaleŝon. Al mi ŝajnis tre stranga tiu-ĉi neordinara rapideco! Ni veturis tiel rapide, ke post duono da horo ni jam atingis hispanajn limojn... Cetere ja nun en la tuta Eŭropo estas fervojoj, kaj krom tio la vaporŝipoj veturas treege rapide!.. (Post ioma promenado). Stranga lando estas Hispanujo! Kiam ni eniris unuan ĉambron, mi ekvidis multegon da homoj kun razitaj kapoj!.. Mi, tamen, divenis, ke ili estas aŭ noblaj hispanaj sinjoroj aŭ militistoj; ĉar ili ĉiam razas la kapojn. Sed al mi ŝajnis tre stranga la konduto de l'regna kanceliero, kiu kondukis min je la mano: li puŝis min en tiun-ĉi malgrandan ĉambreton kaj diris: «sidu tie-ĉi, kaj se vi daŭrigos nomi vin reĝo Ferdinando, mi baldaŭ elbatos el vi tiun-ĉi sensencaĵon!!.

Sed mi, sciante, ke tio-ĉi estis nur tento, provo, respondis neige, kaj por tio-ĉi la sinjoro kanceliero ekbatis min dufoje per la bastono je la dorso tiel forte, ke mi apenaŭ ne ekkriis, sed mi detenis min, ekmemorinte, ke tio-ĉi estas la kavalira moro, kiam oni alprenas ian altan rangon, ĉar en Hispanujo ĝis nun ankoraŭ ekzistas la kavaliraj moroj...

Restinte sola, mi decidis okupi min per la regnaj aferoj... (Li sidiĝas kaj faras diversajn movojn per la manoj, videble ion pripensante; poste li frapas sin je la frunto kaj malrapide leviĝas).

Mi eltrovis, ke Ĥinujo kaj Hispanujo estas unu lando, kaj nur dank'al neklereco oni pensas, ke ili estas tute apartaj landoj!.. Jes, jes.—gesinjoroj, sen ŝercoj: mi konsilas al ĉiuj intence skribi sur

la papero «Hispanujo»,—jen, skribu, mi petas, kaj poste tralegu... Ĉu ne vere?... estas Ĥinujo!.. (Li komencas ree promenadi meditante). Sed min, tamen, treege malĝojigis la okazintaĵo, kiu devas esti morgaŭ: imagu (kun teruro): nia tero sidiĝos sur la lunon!.. Pri tio ĉi ankaŭ skribas fama angla ĥemiisto Velingtono. Mi konfesas, ke mi eksentis fortegan maltrankviliĝon en la koro, kiam mi imagis la neordinaran delikatecon kaj nefortikecon de la luno... La lunon ja oni faras en Gamburgo, kaj malbonege oni ĝin faras!.. Mi tre miras, kial ne atentis tion-ĉi Anglujo?! Ĝin konstruis unu lama barelisto, kaj okulvideble, la malsaĝulo, havis nenian komprenon pri la luno: vidu, li miksis ian rezinan ŝnuregon kun malgranda parto da oleo,—kaj jen dank'al tio-ĉi sur la tuta tero estas sentata tia malbonodorego, ke oni devas ŝtopi la nazojn!.. Kaj dank'al tio ĉi ankaŭ la luno estas tiel delikata globo, ke la homoj tute ne povas loĝi sur ĝi, kaj nun tie loĝas... nur la nazoj... Kaj jen kial ni ne povas vidi niajn nazojn, ĉar ili ĉiuj estas sur la luno... Ĉu vi komprenas min? Jes? Nu mi daŭrigos... Sed kion?... Ha, jes!.. Kiam mi imagis, ke la tero, tiel multepeza, sidiĝinte sur la lunon, povas tute dispecetigi niajn nazojn, min ekkaptis tia teruro, ke mi, vestinte la ŝtrumpojn kaj la ŝuojn, ekrapidis en la salonon de l'regna konsiliĝo, por tuj ordoni al polico ne permesi, ke la tero sidiĝu sur la lunon!.. La razitaj sinjoroj, kiujn mi trovis en la salono de l'regna konsiliĝo en grandega amaso, estis evidente tre saĝaj homoj, kaj kiam mi diris: «Sinjoroj! ni savu la lunon, ĉar la tero volas sidiĝi sur ĝin!»—ili ĉiuj tuj mem deziris plenumi mian reĝan volon, kaj multaj el ili penis eĉ rampi sur la muron, por atingi la lunon,—sed... en tiu-ĉi momento eniris la granda kanceliero!.. Ekvidinte lin, ĉiuj diskuris, sed mi.. (Fiere) mi, kiel reĝo restis!.. Kaj imagu (kun miro kaj teruro): la kanceliero ekbatis min per la bas-



tono kaj ree forpelis min en tiun-ĉi ĉambreton... Kian grandan potencon havas en Hispanujo la popolaj moroj!..

(Li ree sidiĝas en enpensigo).

Mi ĝis nun ne povas kompreni, kia do regno estas Hispanujo? La popolaj moroj kaj la etiketoj de la reĝkortego estas tute neordinaraj!.. Mi ne komprenas, ne komprenas, tute ne komprenas!.. Hodiaŭ oni razis al mi la kapon, malgraŭ tio, ke mi kriis per tuta forto, ke mi ne volas esti monaĥo... (Kun teruro). Sed mi eĉ rememori ne volas, kion mi sentis, kiam oni komencis gutadi mian kapon per malvarma akvo!.. Tian inferon mi neniam ankoraŭ sentis... Mi estis preta freneziĝi, furioziĝi,— kaj oni min apenaŭ povis teni... (En medito). Mi tute ne komprenas la signifon de tiu-ĉi stranga moro... Malsaĝa, sensenca, terura moro! Por mi estas tute ne komprenebla la senprudenteco de la reĝoj, kiuj ĝis nun ne forigas ĝin!.. (Li staras kelkan tempon senvorte, almetinte manon al la frunto). Laŭ kelkaj signoj mi suspektas, ke... ĉu ne trafis mi en la manojn de l'inkvizicio?... Kaj tiu, pri kiu mi opiniis, ke li estas la kanceliero,— ĉu li ne estas mem granda inkvizitoro?! (Paŭzo). Tamen mi tute ne povas kompreni, kiamaniere la reĝo povus esti metita al la inkvizicio?! (Meditante). Vere, ĝi povus esti de la flanko de Francujo... kaj aparte de Polinjjak'... Ho, tiu-ĉi fripono Polinjjak!.. Li ĵuris venĝi al mi ĝis la morto!.. Kaj li ĉiam kaj ĉie min persekutas kaj persekutas!.. Sed mi scias, mia karulo, ke vin gvidas anglo... Anglo estas grandega politikisto. Li ĉien enrampas... Estas jam sciata al la tuta mondo, ke... (sekrete) kiam Anglujo flaras tabakon, Francujo tiam ternas... (Li sidiĝas sur la lito). Hodiaŭ la granda inkvizitoro ree venis mian ĉambron; sed mi, ekaŭdinte ankoraŭ de malproksime liajn paŝojn, kaŝis min sub la tablo. Li, ekvidinte, ke mi forestas, komencis min voki. Komence li ekkriis: «Pop-

riŝĉin!» Mi—neniun vorton! Poste: «Aksentij Ivanov! Oficisto! Nobelo!»—Mi silentas... «Ferdinando la oka, reĝo hispana!..» Mi volis jam elŝovi la kapon, sed poste mi ekpensis: «Ne, mia frato, vi min ne trompos! mi ja scias: vi ree komencos verŝi malvarman akvon sur mian kapon». Tamen li ekvidis min kaj forpelis per la bastono el sub la tablo... Treege dolore batas tiu-ĉi malbenita bastono!.. (Frotante sian dorson kaj sulkiĝante). Treege dolore!.. (Post kelka silento, gaje). Cetere, por ĉio min bone rekompencis mia hodiaŭa eltrovo: mi eksciis, ke ĉiu koko havas sian Hispanujon, ke ĝi kaŝas sin sub la plumaro, tre proksime apud la vosto... (Kun timo). La granda inkvizitoro, tamen, foriris de mi kolera kaj li minacis min per ia puno!.. (Fiere): Sed mi tute malestimas lian senfortan koleron!.. Mi scias, ke li agas, kiel maŝino, kiel instrumento de anglo... (Li kelkan tempon sidas sur la lito, mallevinte la kapon sur la manoj, apogantaj sur la genuoj). (Subite eksaltante kun suferanta vizaĝo): Ne!.. Ne!.. Mi ne havas fortojn suferi plu (li stariĝas sur la genuoj)... Dio, Dio! Kion ili faras al mi!... Ili ne atentis, ne vidas, ne aŭskultas min!.. Kion mi faris al ili? Pro kio ili min turmentas?... (Kun ploro en voĉo). Kion ili volas de mi, mizera?! Kion mi povas doni al ili?... (Li leviĝas kaj etendante la manojn, faras kelkajn paŝojn antaŭen). Mi nenion, tute nenion havas... Mi ne havas fortojn, por elteni tiujn-ĉi terurajn turmentojn... Mia kapo ardas... (Ŝanceliĝante): Ĉio turniĝas antaŭ mi... Dio, Dio!.. (Li falas sur la lito, kaŝante la vizaĝon en la kusenoj kaj kelkajn minutojn kuŝas, mallaŭre plorante, poste eksaltas kaj stariĝas sur la litan genuon). Savu min! prenu min!.. Donu al mi trion da rapidaj, kiel vento, ĉevaloj!.. Sidiĝu, mia veturigisto, sonoru, mia sonorileto, suprenleviĝu ĉevaloj, kaj portu min for de tiu-ĉi terura mondol.. Pli, pli kaj pli malproksimen, ke mi vidu nenion, nenion... (Li

staras jam sur unu genuo kaj je la dua li apogas sin per la kubuto; kun suferanta mieno per dolĉa voĉo): Jen la ĉielo bluiĝas antaŭ mi, jen steleto brilas malproksime... hela, verda steleto... la arbaro flugas kun mallumaj arboj kaj kun luno... griza nebulo sterniĝas sub la piedoj... (almetas la manon al la orelo) la kordo sonas en la nebulo... Jen de tiu-ĉi flanko estas maro senlima kaj tie—Italujo... Jen ankaŭ la rusaj dometoj vidiĝas... (Atente rigardante ien antaŭen). Ĉu ne mia dometo estas vidata en malproksimo?... Ĉu ne patrino mia sidas ĉe la fenestro?... (Etendante manojn antaŭen). Panjo mia, savu vian filon malfeliĉan! Versu almenaŭ unu larmeton sur lian malsanan kapon!.. Ekrigardu, kiel ili turmentas lin!.. Alpremu al via brusto la orfulon mizerindan!.. Li ne havas lokon en tiu-ĉi mondo!.. Oni pelas lin!.. (Kun ploro). Panjeto mia kara! kompatu vian malfeliĉan, malsanan infanon!.. (Li falas sur la liton kun ploro, kiu baldaŭ transiras en la ridon; li leviĝas kaj daŭrigante ridi): ĥa, ĥa, ĥa... Ĉu vi scias gesinjoroj, ke la Alĝeria ĥano havas sub nazo mem grandegan tuberon?... Ĥa, ĥa, ĥa, ĥa...

(Kurteno).

## Uniformo.

Vodevilo en 1 akto de A. P. Karatigin.

Personoj:

Jozefo Razgildjajev—oficisto.  
Iohano Gutorin—advokato.  
Anno Lubeckaja—vidvino.  
Grigorio Meluzga—fakestro.  
Teklo—kuiristino de Razgildjajev.  
Servanto de Meluzga.  
Fadejev—gardisto el oficejo.

La scenejo prezentas malgrandan ĉambron, en kiu ĉio estas tute senordigita: la komodo kun eltiritaj kestoj, tablo kun disĵetitaj paperoj; meze estas la pordo ĉe antaŭĉambro, dekstre—alia pordo kun ekstera seruro.

APERIO I.

Teklo (sola, balaas la ĉambron). Jen kia homoj! Ĉiam ĉio estas disĵetita, senordigita: neniuj objektoj estas en ĝusta loko; kaj mi ĉiam kaj ĉiam devas ordigi post li, kaj li tamen diras, ke en tio-ĉi estas kulpa nur mi! Jen, vidu: la pantoflo estas sur la komodo, la viŝtuko en la surtuto; la ĉapelo sur la planko, kaj la boto sur la tablo... Kaj jen du dudekkopekaj moneroj faliĝas sur la planko!.. Kia riĉulo, ŝajne! Kaj poste li krias, demandas, kie es-



tas mono? Nu, mia sinjoro, vi estas pli senorda, ol iu malgranda infano! Aĥ! Ŝajne iu venis.

## 2) Teklo kaj Gutorin.

Gutor. Bonan matenon, Teklinjo.

Teklo. Bonan matenon, sinjoro!

Gutor. Nu, ĉu li vekigis?

Teklo. Kion vi diras, sinjoro, jam antaŭ duono da horo li forveturis.

Gutor. Forveturis? Tiel frue; do kien?

Teklo. Al la direktoro, mia sinjoro.

Gutor. A, sekve, ia aparta afero?

Teklo. Jes, certe, ia aparte grava.

Gutor. Ĉu li ofte veturas al la direktoro?

Teklo. Ne, ĉe mi nur unuan fojon li ricevis tielan honoron... Hieraŭ li ordonis al mi nepre lin veki je la sepa horo. Se mi tro dormos, Tekliujo, li diris,—vi memorigu, ke mi devas veturi al la direktoro; kaj mi ĝuste tiel faris, ja ne estas eble: serioza afero! Mi volus samovaron doni, sed li diris: mi ne havas tempon, poste; poste li volis sin razi, mi alportis de najbaro varmegan akvon, sed mi jam ne trovis lin hejme: li malaperis.

Gutor. Kia strangulo! Do kiamaniere li hieraŭ petis min veni al li je la naŭa matene? li volis pri io grava konsiliĝi.

Teklo. Nu, mia sinjoro, pro tio-ĉi vi ne ofendiĝu, li ĉiam tiel kondutaĉas; li pri unu parolas kaj la alian faras, kaj samtempe komencas ion trian. Mi jam alkutimiĝis: pri ĉio oni devas al li rememorigi, li mem nenion memoras! Li tia dist-rulo estas, ke mi eĉ rakonti al vi ne povas... Se, ekzemple, mi ne donus al li tagmanĝi, li ĝis vespero mem nenion diros, kaj eĉ pri vespermanĝo ne demandas.

Gutor. Nu, bona bravulo! Sed kio kun li fariĝis? Antaŭ mia forveturo Moskvon, li kvankam estis iom forgesema, sed ne tiel.

Teklo. Amflamaĵo estas, mia sinjoro.

Gutor. A!

Teklo. Li edziĝi volas.

Gutor. Ĉu povas esti?

Teklo. Jes!.. Kion homoj faras, tion ankaŭ ni (ŝi svingas per la mano). Sed ĉu povas bovido kapti lupon? Kredeble, ree, kiel antaŭe, li kun nenio restos. Li, mia falketo, dufoje eĉ jam fianĉo estis, sed poste li ĉiam faras ian strangajon, kaj—ĝis revido! Kion diri? sinjoro estas bonega, kaj homo estus sperta, sed nenion aferon oni povas al li komisi... Aĥ! Mi ŝajne ne fermis la pordon, kaj jen iu en la kuirejon venis.

## 3) Samaj kaj la servanto (kun pakaĵo).

Serv. Bonan matenon, Teklo. Ĉu sinjoro estas hejme?

Teklo. Por kio vi lin bezonas?

Serv. Por kio? se mi demandas, sekve bezonas. Iru kaj diru al li.

Teklo. Sed de kie mi lin prenos? li forveturis.

Serv. Forveturis!.. Aĥ, Dio mia... Kion vi faras kun via sinjoro? al kio ĝi similas!..

Gutor. Kio okazis, mia kara?

Serv. Vidu, sinjoro, li nian uniformon forprenis.

Gutor. Kiamaniere?

Serv. Hieraŭ li estis ĉe ni, poste oni ludis biliardon, en la ĉambro estis varmege, kaj sinjoroj formetis la surtutojn; kaj li surmetis nian uniformon.

Teklo. Aĥ, Dio mia, do kiel mi ĝin ne divenis.

Serv. Hodiaŭ mia sinjoro devis veturi al sia estro je la oka horo, li ricevis hieraŭ la inviton,—li prenis uniformon kaj ekvidis, ke ĝi estas ne lia; li komencis min insultadi, sed ĉu mi estas kulpa? Ja estis multe da gastoj, ili foriris malfrue, mi ja ne povis ĉiun ĉirkaŭrigardi. «Certe,—diris mia sinjoro,—freneza Razgildjajev ŝanĝis!» Nu, kion fari?

Mia sinjoro vestis nigran surtuton, kaj sendis min ĉi-tien kun lia uniformo.

Teklo (kun moko). Kia malĝojo!

Serv. Verdire, Teklo Nikitiŝna, mi ne komprenas, kial tia strangulo estas via sinjoro; ja mia sinjoro estas troege pli malgranda, ol la via, do kiamaniere li enŝovigis lian uniformon?.. Mirinda afero! Ni, la lakeoj, iafoje dibočas kaj venas hejmen eĉ sen surtuto, sed la malpropran ni ne prenas.

Teklo. Jen estas grava afero!.. Do kion fari? Ja nia uniformo estas pli larĝa, ol la via,—sekve ĝi taŭgus por via sinjoro.

Serv. Malsaĝa vi estas... Ja via uniformo estas de tute alia ministrejo!

Teklo. Ĝi nenion signifas; se okazis la eraro, oni povus klarigi tion-ĉi al la estro.

Serv. Vi opinias, ke tio-ĉi estas kvazaŭ en via kuirejo: ĉu kulero, ĉu forko—estas tute egale? Ja mia sinjoro havas la arĝentajn butonojn, kaj via—la orajn.

Teklo Bagateloj, ja kun oraj butonoj estas ankoraŭ pli bele.

Serv. Nu, mi ne povas paroli kun vi!.. Sed alian fojon mi vian sinjoron tute ne akceptos? Jen, prenu lian uniformon, kaj mi poste venos, por preni la nian; sed vi devas esti pli zorgema, se vi plenumas la lakean oficon! (Li foriras).

#### 4) Gutorin kaj Teklo.

Teklo. Vidu, kiel li fanfaronas! Kvazaŭ io graval Lakeo! Lakeo... Sed se li ne estas sufiĉe riĉa, por havi lakeon... Ho, vi, lakeoj... Kiam vi nur komencas purigi sinjoran veston, vi antaŭ ĉio la poŝojn elpurigas, kaj mi eĉ unu kopekon ne prenas!..

Gutor. Nu, ĉesu, ĉesu, Teklinjo!

Teklo. Mi ne povas, sinjoro, se li min ofendas. Jen mi antaŭnelonge du dudekkopekajn mone-

rojn trovis kaj tuj metis ilin sur la tablon, sed tiela lakeaĉo nepre forportus ilin en drinkejon... Jen, vidu, li eĉ la uniformon alportis malpuran, ĝi tuta estas kretigita, kvazaŭ tuj el farunejo (sonoro).

Gutor. Ĉu ne li tie sonoras?

Teklo. Ne, sinjoro, oni sonoras al najbaro... Lakeo! lakeo! Li dum festoj eĉ vestojn de sia sinjoro surmetas, kaj mi neniam tion-ĉi faros.

Gutor. Nu, mi ne povas lin atendi... Do diru al li, kiam li venos, ke mi estis ĉe li, kaj ke mi ne havis tempon lin atendi. (La sonoro aŭdiĝas pli forte).

Teklo. Bone, mia sinjoro... Vidu, kiaj! Oni, kredeble, ree sonoras ĉe malplena loĝejo apud ni... Ja oni forŝiros la sonorilon, dume tie neniulo loĝas. (Malfermante la pordon). Nu, pro kio vi sonoras, kiun vi bezonas? Ili jam longe forveturis en alian loĝejon, tie neniulo estas; vi demandu la pordiston... Dio mia! Ja tio-ĉi estas mia sinjoro.

Gutor. (ridante). Kaj li sonoras ĉe malpropra pordo; bonege, li eĉ sian loĝejon ne scias!..

#### 5) La samaj kaj Razgildjajev (en palto, en ĉapelo kaj kun malkovrita pluvombrelo).

Razgil. Nu, fine vi venis! Do kial vi ne malfermas la pordon? Mi sonoris tutan horon!

Teklo. Sed pro kio vi sonoras ĉe malplena loĝejo?

Razgil. Do vi aŭdis?

Teklo. Mi aŭdis... sed vi nenion vidas.

Razgil. Hel.. Iru for, malsaĝulino.

Teklo (forirante). Jen vidu: mi—malsaĝulino!

Gutor. Dio mia! Vizaĝo estas tute laca... malpropra uniformo kaj... ĥa... ĥa... ĥa!.. kun pluvombrelo en la ĉambro!..

Razgil. Ha! Nikanoro Ivanoviĉ! Bonan matenon, mia kara! Ĉu vi jam longe venis.



Gutor. Jam preskaŭ kvaronon da horo mi vin atendas.

Razgil. Do kion ĝi signifas, ke vi venis al mi tiel frue? Ĉu ne okazis io?

Gutor. Ja vi mem petis min veni...

Razgil. Mi? Kiam?

Gutor. Jen estas bone! Sed hieraŭ...

Razgil. Jes, jes, jes... mi vin tre dankas, ke vi ne forgesis... jes, jes, mi vin treege dankas: la afero estas tre grava...

Gutor. Sed vi komence rakontu, kio kun vi okazis? Pro kio vi revenis?

Razgil. Mi vin ne komprenas... Kien mi revenis?

Gutor. Nu, ĉi-tien... Ĉu vi ion forgesis?

Razgil. Nenion mi forgesis... Mi ĉion bone memoras. Kial vi atakas min per viaj strangaj demandoj? Ja tiu-ĉi loĝejo, ŝajne, estas mia?..

Gutor. Jes, sed kial vi mem estas tiel stranga? Por kio vi vestis malpropran uniformon?

Razgil. Malpropran?.. Ah! Dio mia! Bone, ke vi min memorigis... Nome pro tio mi ja revenis... Imagu, mia karulo... Hieraŭ mi estis ĉe Puĉeglazov kaj, kredeble, iamaniere, rapidante, mi vestis...

Gutor. Mi jam ĝin scias, kaj ĝuste pri tio mi volas vin atentigi...

Razgil. En ĉio estas kulpa Teklo... ŝi tute nenion rimarkas!.. Ŝi ja vidis, ke mi vestis malpropran veston, kaj ŝi nenion al mi diris... ŝi pri nenio pensas, malsaĝulino!.. Imagu, karulo, kia anekdoto okazis pro tiu-ĉi uniformo. Vi ja scias, ke, rilate al mia ofico, mi estas tre akurata homo: mi ĉiam ankoraŭ vespere notas, kion mi devas fari matene. Same ankaŭ hieraŭ: veninte hejmen de Puĉeglazov, mi elprenis el la flanka poŝo diversajn paperojn, dismetis ilin kaj trovis la avizon: «Lia generala moŝto, s-ro direktoro, petas vin morgaŭ je la oka horo matene veni al li loĝejon pro ekstera afero; se li dormos, bonvolu ordoni veki lian

generalan moŝton». Mi penis ekmemori: kiam mi ricevis tiun-ĉi inviton? Kaj... se vi min eĉ mortbuĉus, mi nenion memoris... Tamen, se la avizo estas en mia poŝo, sekve ĝi min invitas... Tial mi ordonis, ke oni min veku je la sepa kaj mi ekiris al la direktoro; mi venas, sed li dormas. Mi petas lin veki: la lakeo ne volas; mi diras, ke estas ordonite; la lakeo iras en la dormejon de lia generala moŝto. Mi sidiĝas kaj aŭdas, ke lia generala moŝto bonvolas ion murmuri kaj ke li tre koleras... Nu, mi pensas: certe lia generala moŝto estas en malbona humoro; sed mi tute tion-ĉi ne atentis, ĉar mi ne estas kulpa; fine, lia generala moŝto eliras negliĝe, sen peruko... Kiam mi ekvidis lin sen peruko, mi, je Dio, ektimis, kvazaŭ froston mi eksentis en la tuta mia korpo! Li rigardas min, kvazaŭ ia sovaĝa besto, mi silentas... Li sulkiĝas, mi—neniun vorton; poste li bonvolis oscedi,—mi ankaŭ, pro ĝentileco, oscedas; fine, li demandas: «kio okazis?» Mi respondas: «kion vi ordonos, via generala moŝto; li rigardas min kun mirego, mi ankaŭ lin rigardas. Poste li demandas: «ĉu vi estas sana?» Mi respondas: «dankas kore, mi estas tute sana, kaj kiel vi bonvolas farti, via generala moŝto?—Vi, kredeble, li diras, malbone dormis hodiaŭ? «Mi intence, mi respondas, ordonis min veki pli frue, por ne malfruigi veni al via generala moŝto».—Sed kion vi bezonas de mi?—«Laŭ ordono de via generala moŝto»—mi respondas kaj prezentas al li la avizon. Li ĝin tralegis, kunpreminte la ŝultrojn, aliflankigis la avizon, ekrigardis la adreson kaj diris: «Ĝi estas tute ne de mi kaj eĉ ne al vi: vidu, tio-ĉi estas malpropra letero!.. Mi kvazaŭ mortis!..

Gutor. Mi imagas!

Razgil. Poste li ĉirkaŭrigardis min de l'kapo ĝis la piedoj, turnigis min .. kaj diras: «kion ĝi signifas? Sur vi estas la uniformo de alia ministrejo?! Mi ekrigardis la butonojn, kaj de blankaj

agloj en miaj okuloj fariĝis mallume!.. Se vi—li diras—ne volas servi en nia ministrejo, vi povas ekŝiĝi!—Mi diras: via generala moŝto, pardonu min bonfavore, mi ne rimarkis... erare! «Bone, li respondas, kiel mi vidas, iras viaj oficaĵ aferoj». Li diris ion france kaj foriris en la dormejon. Mi salutis lin kaj rapidege forkuris, kvazaŭ brogita!

Gutor. Nu, mia kara, direktoroj tielajn ŝercojn ne amas... Mi konsilas al vi alivestiĝi, veturi al li kaj humilege peti pardonon.

Razgil. Nepre, nepre,—mi pro tio nome revenis hejmen... Diablo ĝin prenu! Estas tre ĉagrene!.. Aparte se pri tiu-ĉi historio ekŝiros mia kamarado s-ro Meluzga; li tuj mem sciigos pri tio-ĉi la tutan urbon... Imagu, kion li jam rakontadis pri mi...

Gutor. Nu, ni lasu lin... Do la aferon, pro kiu vi min invitis, ni prokrastu ĝis alia revido...

Razgil. Ne, karulo, ne,—mi ne povas, ĝi estas tia afero... tiel grava afero, ke nepre oni devas fini ĝin dum nuna mateno; de ĝi, povas esti, dependas mia feliĉo, mia estonteco... kaj vi, pro amikeco, min helpos... Vi ja estas leĝisto, juristo... vi scias ĉiujn leĝojn, kiel siajn proprajn kvin fingrojn.

Gutor. Do kia estas tiu-ĉi afero?

Razgil. (surmetante la ĥalaton super la uniformo). Tuj, tuj; mi nur vestos la ĥalaton, por ke mi povu pli libere labori, kaj mi jam ne iros en la oficejon... ni kune nin okupos per la afero, kaj al tagmanĝo ĉio estos preta. (Eniras Teklo). Nu, kion vi bezonas ankoraŭ? Kion vi volas?

Teklo. La lakeo de Puĉeglazov venis por preni la uniformon.

Razgil. Nu, bone... donu ĝin kaj foriru, ne malhelpu nin! (al Gutorin). Vidu, mia kara, en kio estas la afero...

Teklo (serĉas la uniformon). Sed kien vi ĝin metis, sinjoro?

Razgil. Ah! kiel ŝi min tedis!

Teklo. Ja tio-ĉi estas via uniformo, sed kie estas la malpropra?

Razgil. Ĉu mi ĝin forglutis? Serĉu ĝin kie vi volas, sed lasu min trankvila... Jen, vidu, la afero estas tre simpla; oni devas nur ricevi la informon: ĉu ekzistas tia leĝo, sur kies fundamento... ekzemple... la vidvino... en uniformo de alia ministrejo...

Gutor. Kion? Kion vi parolas? vidvino en uniformo de alia ministrejo?..

Razgil. Ah, ne, karulo, mi pensas... mi pensas, kiamaniere mi ĝin vestis hieraŭ?

Gutor. Kaj mi miras, kial vi ĝis nun ĝin ne formetas ankoraŭ...

Razgil. Kiel ne formetas?.. Ĉu mi... Ah, diablo ĝin prenu!.. Nu, jen, prenu kaj foriru! (Li ĵetas al ŝi la ĥalaton).

Gutor. Ha, ha, ha!.. Jen estas komedio!..

Teklo. Ne... la ĥalaton vi mem vestu mia sinjoro, sed donu la uniformon...

Razgil. Vi nenion rimarkas, kaj mi pro vi, maljuna malsaĝulino, ĉiam ankaŭ estas malsaĝulo! (li formetas la uniformon kaj vestas la ĥalaton).

Teklo. Nu, mia kara sinjoro, en tio-ĉi mi ja neniom estas kulpa! (Ŝi volas foriri).

Razgil. Haltu, haltu!.. Jes... do kion mi volis demandi?... Jes... ĉu mi trinkis teon?

Teklo. Ne ankoraŭ, mia sinjoro.

Razgil. Vidu! Vi nenion al mi memorigas! Donu—do la samovar! (Teklo foriras).

Gutor. Nu, ĉesu koleri pro bagateloj, pli bone vi daŭrigu pri via grava afero.

Razgil. Atendu... pli bone mi ĝin tralegos al vi... Mi jam preskaŭ ĉion skribis... Sed kien ĝi malaperis? (Li disĵetas la paperojn sur la planko). Mi memoras, ke hieraŭ ĝi tie-ĉi estis.

Gutor. Ĉu ĝi estas ia via ofica afero?

Razgil. Ne, karulo... unu persono al mi komisiis esti advokato por ŝia afero...



Gutor. Vidu, kia vi estas! Vi de ni forprenas aferojn!

Razgil. Jen, ŝajne, ĝi... ne, ĝi estas de komercisto Sevrjugin pri aĉeto de lignoj... Jen, jen... ne, ree ne ĝi... Jen, kia diablo (li paŝas sur disĵetitaj paperoj).

Gutor. (ridante). Nu, mia kara, mi vidas, ke vi bonege aranĝas la aferojn!

Razgil. Kiel ĝi estas ĉagrenal.. Ju pli mi rapidas, des pli malbone. Nu, estas tute egale, mi dume vorte al vi klarigos...

Gutor. Nu, bone, rakontu...

Razgil. Jen vidu... Konsentu, ke fraŭla vivo en mia aĝo estas tre malagrable...

Gutor. A, jen, kio;—vi nome pri ĉi tio volis kun mi konsiliĝi?

Razgil. Ne... tio ĉi estas alia... interalie... Tamen, ja mi fine devas edziĝi. Ĉu ne vere?

Gutor. Kompreneble; ĝi estas ankaŭ tre bona afero! Bona edzino estas trezoro.

Razgil. Nu, dankas! Mi tute kredis, ke vi aprobos mian intencon... Ah, kiel efektive mi estas distrema: mi eĉ ne demandis vin, kiel fartas via estimata edzino?

Gutor. Mia edzino? Mi, karulo, ankoraŭ ne estas edzigita!

Razgil. Ĉu efektive? Strange? Do de kie al mi venis tiu ĉi penso?

Gutor. De nenie... Simple malgranda distreco...

Razgil. Jen bone... distreco! Mi ĉion memoras... Vi skribis al mi, ŝajne, antaŭ dek jaroj, ke vi intencas edziĝi.

Gutor. Nu, kian malnovaĵon vi ekmemoris! Jes, mia amiko, mi edziĝus... sed...

Razgil. Do kial ne?

Gutor. Ĉesu, ĉesu,—ni ne parolu pri tio ĉi. La afero estas jam decidita, kaj antaŭ longe estas kaŝita en la kora kaŝejo,—kaj nun vi jam ne tuŝu ĝin.

Razgil. Ne, ne,—ĝi estas malbona! Vi scias, kiel mi vin amas... vi devas al mi ĉion rakonti. Mi ja estas via amiko.

Gutor. Mia amiko! En la mondo ne ekzistas amikoj; ekzistas nur friponoj!

Razgil. Ĉu efektive?

Gutor. Amiko unu mia vera  
Elmontris amikecon sian,—  
Kaj nun la amikec' sincera  
Ne kaptos jam animon mian.

Razgil. Vi ne pri ĉiuj tiel diras?

Gutor. Ho, kedu, se vi malamikojn  
Por vi akiri ne deziras,  
Ne penu havi vi amikojn!

Jes, mia kara, antaŭ dek jaroj mi, efektive, estis jam preskaŭ fianĉo, ĉio estis aranĝita, sed unu bona amiko, kiu eĉ multe ŝuldis al mi, kalumniis min antaŭ la patro de mia fianĉino, oni min rifuzis, ŝin oni edzinigis preskaŭ perforte, kaj mi forveturis Moskvon... Ah, kial vi ekparolis pri ĝi... Ridinde estas diri, sed mi ĝis nun ankoraŭ malĝojas pri ŝi, ĝis nun mi ne povas ŝin forgesil.. Nu, estu sufiĉe,—kio pasis, tio pasis. Pli bone vi rakontu pri via afero.

Razgil. Mi vin tre kompatas... sed... fraŭlinoj estas tro facilanimaj, ili ĉiam havas venton en la kapoj; laŭ mi plej bone estas edziĝi je vidvino... Ah! karulo, se vi vidus mian vidvineton!..

Gutor. A! vi edziĝos je vidvino? Kaj inter vi jam ĉio estas finita?

Razgil. Kontraŭe, ankoraŭ nenio komenciĝis, sed mi esperas... Jen nome pri ŝia afero mi volas kun vi konsiliĝi. Ŝi antaŭ du monatoj alveturis tien ĉi, por klopodi pri sia afero; dum tiuj ĉi tagoj estas necese sendi la petskribon en la senaton. Ŝia onklino jam longe estas konata kun mi, kaj ŝi promesis svati ŝin, se nur mi helpas al ili gajni tiun ĉi aferon.

Gutor. Bonege! ni vin volonte helpos.

Razgil. Mi dankas, amiko,—sed jen estas mal-

feliĉo: en pasinta semajno ili ambaŭ treege je mi ekkoleris.

Gutor. Pro kio?

Razgil. Ah, tiu ĉi mia kamarado Meljuzga min ĉikanis!.. li iamaniere enrampis en ilian hejmon, li komencis amindumi kaj flirti kun la vidvineto, kaj imagu, kion li kalumniis al ili pri mi! Kvazaŭ mi estas homo malsprita, distra kaj ke se ili ne transdonos sian aferon al iu alia, ili ĝin nepre malgajnos. Mi estas distra! Kia sensencaĵo! Ŝajne, ne ekzistas homo pli akurata, ol mi; mi ĉiam bonege ĉion memoras.

Gutor. Nu, kaj kiel nomiĝas via vidvineto?

Razgil. Kiel nomiĝas?... Tio estas... vi volas scii ŝian nomon, aŭ nomon de ŝia patro?..

Gutor. Ĉu vi forgesis?

Razgil. Nu, kion vi diras!.. Kvazaŭ tiu ĉi Meljuzga!.. Ĉu oni povas ŝin forgesi!.. Ŝi nomiĝas... Kien mi metis ŝiajn paperojn?.. En ili ĉio estas detale priskribita... kiel ŝi nomiĝas, kaj kiu estis ŝia edzo, kaj pri kio ŝi klopodas... ĉio, ĉio...

Gutor (al publiko). Dio mia! Kiel malfeliĉa estas tiu vidvino, kiu komisiis al li sian aferon!..

## 6. La Samaj kaj Teklo (kun letero).

Teklo. Leteron oni alportis, mia sinjoro.

Razgil. De kiu?

Teklo. De ia vidvino, oni diras.

Razgil. (Kaptante la leteron). Dio mia! Ĝi estas sendube de ŝi!

Gutor. De via vidvineto?

Razgil. Ah, kia feliĉo! Ŝi unuan fojon al mi skribas!.. Pardonu, mi petas... (legas). „Kion vi faras kun ni? Jen jam pasis du semajnoj, kaj vi ne povas prepari tiun paperon, pri kiu ni vin petis; post morgaŭ estas lasta limtempo. Se vi ne povas aŭ ne volas ion fari, pro Dio, resendu al ni la paperojn!..“ Dio mia! Kion ŝi pensas pri mi?

Kion mi faris? Kien mi metis ŝian paperon? Iru, diru al sendito, ke mi tuj venos... Haltu, haltu!.. Helpu min, mi petas... la afero estas bagatela!.. oni devas nur aldoni la informon el leĝaro... iru kaj diru al li, ke... bone... Vidu, ŝi havas ian aferon... pri io... Haltu, atendu. Diru al li, ke li atendu... Ĉu vi ne havas la leĝaron? Alportu ĝin, mi petas!..

Gutor. Kiel? ĉiujn volumojn?!

Razgil. Ne, ne... ne ĉiujn, sed oni devas informi ĝin en tiu volumo, en kiu estas... ĉi-tio... Ĉu vi komprenas?

Gutor. Povas esti vi bezonas la dekan volumon?

Razgil. Jes, jes,—la dekan; mi nome tion ĉi volis diri. Helpu min, mi petas,—kune ni tuj finos; alveturigu plej baldaŭ tiun ĉi naŭan volumon. Se vi, efektive estas mia amiko,—vi prenu veturiston, ne prokrastu,—kaj mi dume trovos la paperon.

Gutor. Nu, bone; mi tuj revenos... Ho, malfeliĉa vidvino! (Li foriras).

## 7. Razgildjajev kaj Teklo.

Teklo. Do kion mi devas diri al la sendito?

Razgil. Sendito? Al kiu sendito?

Teklo. Nu, al lakeo de tiu sinjorino...

Razgil. Preparu ĉion, por ke mi povu min razi.

Teklo (al publiko). Jen ĝustan tempon li elektis! (al li). Kaj la sendito atendu, aŭ ne?

Razgil. Jes, li atendu. Mi tuj skribos... efektive mi devas skribi, peti pardonon... Ĝi estos plej bona. (Skribas kaj parolas). „Pro Dio, ne koleru je mi! Mi vin amas, adoras, kaj post unu horo ĉio estos preta... Nur unu via anĝela ekrigardo, kaj mi estos plej feliĉa homo en la tuta mondo“. Bonege, bele, mallonge kaj hele!..



Teklo (eniras kun glaso da akvo). Jen estas la akvo, mia sinjoro.

Razgil. Donu la kandelon!

Teklo (forirante). Oh, mia sinjoro, vi tute laciĝis min, maljunulinon... Estus bonege, se vi edziniĝus pli baldaŭ,—povas esti, ke la edzino vin akuratiĝus.

Razgil. Cetere, estas tute egale... oni povas eĉ tute ne sigeli... Mi devas min razi plej rapide, alie mi povas poste forgesi kaj mi veturos al ŝi ne razita... (Li sapas la barbon). Ĉu efektive ŝi ne kompatos min? Mi petos la onklinon, ke ŝi min defendu.

Teklo (enirante). La gardisto el la oficejo venis.

Razgil. Kion li bezonas?

Teklo. Mi ne scias; li diras, ke li bezonas vidi nepre vin mem.

Razgil. Nu, voku lin. Kio povas esti pli malagrablega, ol kiam vi rapidas, volas vin razi, kaj oni vin tiel tedege malhelpas!

### 8. Razgildjajev kaj Fadeev.

Fad. Salutas vin, via sinjora moŝto!

Razgil. Bonan tagon, kara... mi forgesis vian nomon... Kion vi bezonas?

Fad. La fakestro vin postulas al si, laŭ ordono! de l'sinjoro direktoro, via sinjora moŝto.

Razgil. (Saltante). Nu, jen! Ĉio pro tiu ĉi malbenita uniformo! Diru, karulo, ke vi ne trovis min hejme.

Fad. Mi ne povas, via sinjora moŝto!

Razgil. Jen, ricevu dudek kopekojn kaj iru for al diablo!

Fad. Kore vin dankas, sed vi bonvolu iri kune kun mi.

Razgil. Nu, jen vi havas ankoraŭ dudek kopekojn,—sed vi nur diru, ke vi min ne vidis, ke mi ne povas leviĝi el la lito.

Fad. Neniel mi ĝin povas fari, via sinjora moŝto.

Razgil. Tamen, do kion vi ankoraŭ bezonas? Mi estas malsana!—Mi malvarmumis; al mi doktoro ne permesis eliradi el mia ĉambro. Ĉu vi min perforte trenos.

Fad. Mi neniel povas, via sinjora moŝto. Plej bone vi bonvolu skribi leteron,—sed mensogi antaŭ estraro servantoj ne havas rajton.

Razgil. Nu, bone... tuj,—atendu iom... Malbenita fakestro! Li ĝojas nun je ĉi tiu okazo... li ĉion al ili rakontos! (Li skribas). «Mi estas malsana kaj ne povas veni en la oficejon, kaj se vi, laŭ kutimo, min ne konfidas, tiam sendu la doktoron. Via humila servanto»... Kiel mi nomiĝas?.. Nu tute egale,—mi skribos la komon...

Teklo (enirante). Antaŭa sendito diras, ke li ne havas tempon atendi. Kion vi ordonos al li diri?

Razgil. (donas al ŝi la leteron). Jen, jen,—donu ĝin al li... Nu, glor' al Dio, mi ĉion jam iomete aranĝis... Oni tute malkomprenigis mian kapon.

Fad. Do bonvolu al mi doni, via sinjora moŝto.

Razgil. Kion ankoraŭ?

Fad. La leteron al la fakestro. Ja li sen letero min ne konfidos kaj ree forfelos al vi.

Razgil. Ĉu mi ne donis ĝin al vi?

Fad. Ne, via sinjora moŝto, mi nenion ricevis.

Razgil. (donante al li la unuan leteron). Nu, prenu, jen ĝi estas. Sed se li ion demandas, vi nenion al li rakontu.

Fad. Mi obeas, via sinjora moŝto.

Razgil. Nu, vi povas foriri.

Fad. Feliĉe restu. (Li foriras).

### 9. Razgildjajev kaj poste Teklo.

Razgil. (sola). Fu! mi tute laciĝis! Nu tage-to!.. Ŝajne nun jam ĉio estas aranĝita... Kaj oni kuraĝas min nomi distra! Kvazaŭ distruloj parolas

tiel prudente. Mi ĉion memoras, tute ĉion... Sed kion mi devis fari?... Ion tre necesan... jen, vidu,—mi ree forgesis!.. Aĥ, kia memoro!.. Oni devas demandi Teklon,—ne... ŝi ankaŭ nenion memoras... Mi... mi ion perdis... jes, efektive!.. Do kion mi perdis?... A, mi ekmemoris! Mi serĉis la paperon de tiu mia... ĉarma vidvineto... Ja matene mi, ŝajne, metis ĝin en la flankan poŝon... Jen estas mia uniformo... sed en ĝi nenio estas... Kiu povis ĝin preni? Aĥ, diablo vin prenu! ja matene mi estis vestita en malpropra uniformo, kaj mi ĝin jam forsendis... Oni devas tuj veturi al Puĉeglazov (li surmetas la ĉapelon), ke li iamaniere ĝin ne elfaliĝu!..

Teklo (alportas la samovaron). Nu, jen la samovaro estas preta. Trinku por sano kaj mi dume alportos biskvitojn (ŝi foriras).

Razgil.(staras, konsiderante, antaŭ la samovaro). Hm!.. jes... Kiel bona kaj utila elpenŝaĵo estas la samovaro!.. Hm... Sed por kio ŝi ĝin alportis? Ĉu mi ne trinkis ankoraŭ la teon? Sekve mi ne trinkis, se ŝi ĝin alportis... Ja efektive, estas iel seke eĉ en... mia kapo de hodiaŭaj klopodoj... Jen, kiam mi edziĝos, mi ne bezonos jam min okupi per ĉi-tio... Estas, ŝajne, simpla afero... ĉu ĝi estas tiel malfacile... meti la teon... la sukeron... (Li faras ĉion tute male). enverŝi bolantan akvon... ja estas bagateloj. (Li malŝtopas la kranon kaj foriras de la tablo; akvo fluas sur la tablon kaj sur la plankon).—ŝajne jes... sed tamen ni, viroj, neniam povas fari tiel, kiel virino... jes, la mastrino en domo estas... granda afero...

Vivo de fraŭlo min tendas terure,

Devas kompati vi min:

Tempon pasigi ne povas plezure

Mi sen amata edzin'.

Ĉie—senordo, loĝejo malpura...

Estas nek vivo, nek mort'...

Kiel severa, kruela, terura

Estas por mi mia sort'!

Krom malbonaĵoj en hejmo, turmentas

Ankaŭ eĉ servo min mem...

Ĉiam doloron en koro mi sentas

Sen la edzina amem'!..

Mi ne komprenas, pro kio mi restas

Ne edzigita ĝis nun?

Tuj mi edziĝos, ĉar tempo jam estas...

Jam estas la deka horo!.. Efektive estas tempo... Tiamaniere mi povas malfruiĝi (li metas la palton super la ĥalato). Mi devas veturi al Puĉeglazov por preni la paperojn... Jen, oni diras, ke mi estas distra! Mi ĉion memoras, kio estas necesa...

Teklo (eniras kun biskvitoj). Jen biskvitoj, mia sinjoro: manĝetu por sano.

Razgil. (en la ĉapelo). Donu al mi la ĉapon.

Teklo. Sed kien vi intencas iri?

Razgil. Vi ne bezonas ĝin scii, malsaĝulino. Vi nenion rimarkas: vi ja vidas, ke sur mia kapo estas ĉapelo, kaj vi nenion diras... Mi baldaŭ revenos, kaj se iu min vizitos, vi salutu lin kaj diru... ke mi... foriris (li foriras).

Teklo (sola). Bonega li estas! Salutu, sekve la niajn, kiam vi ekvidos la viajn! Kien li foriris? Aŭ, povas esti, li malsobriĝis!.. (Rigardante akvon sur la planko). Aĥ, Dio! kion li faris tie-ĉi sen mi!.. Ĝusta maro senlima... Tutan samovaron senakvigis kaj mem forfluis!.. Jen efektive mekanikistoj!.. Jen, servu, se vi volas, ĉe tiu ĉi frenezulo; kaj li ankoraŭ deziras edziĝi!.. Estas ridinde! Li povas sendube fianĉiĝi kaj poste eĉ el preĝejo forkuri—je Dio!.. Vidu, kion li tie-ĉi faris! (Ŝi ordigas).

## 10. Teklo kaj Ljubeckaja.

Ljub. Ĉu tie-ĉi loĝas s-ro Razgildjajev?

Teklo (al publiko). Jen kia ornamita... Dio sankta!.. Sendube tio-ĉi estas la fianĉino...



Ljub. Mi vin demandas, ĉu tie-ĉi loĝas s-ro Razgildjajev?

Teklo. Tie-ĉi, mia estimata sinjorino, tie-ĉi; mi petas... ni ĝojas je kara gastino.

Ljub. Kaj li kuraĝis sendi al mi tielan leteron?

Teklo. Sidiĝu, mi petas, estimata sinjorino, li baldaŭ revenos.

Ljub. Kiel? Ĉu li ne estas hejme?

Teklo. Li tuj foriris, sinjorino,—sed sidiĝu, sidiĝu, ripozu; li baldaŭ revenos.

Ljub. Mizera homaĉo! Kaj al tiu-ĉi frenezulo ni komisiis nian aferon! Kaj li ankoraŭ petis la onklinon, ke ŝi lin svatu al mi! Ho, kiel mi kole-regas je li!.. Mi lin atendas, nepre atendas, por lin insultegi kaj malpaciĝi kun li por ĉiam!..

Teklo. Ah, kiel luksa, kiel bela! Nu, mia sinjorino, ankoraŭ estas sufiĉe bela, iom neakurata—vere,—sed laŭ aspekto estas ankoraŭ tre agrabla... La paro estos bonega!.. Kion fari? Oni devas ŝin iomete flateti: estonta mia mastrino!.. Vi, kara mia sinjorino, bonvolu esti bonfavora al mi.

Ljub. Kion vi volas?

Teklo. Kompreneble, sinjorino, afero estas konata, pri kio paroli... Kompreneble, povas esti, ke en komenco mi vin ne kontentigos, sed vi ne koleru; ja mi servas al mia sinjoro dum dek jaroj, kaj li estas kontenta je mi, kvankam iafoje li min insultas... sed mi ne estas postulema, mi ja ricevas nur ok rublojn monate... Nu, kaj nun mi jam havos pli multe da laboro, tial vi sendube unu—du rublojn aldonos...

Ljub. Kiel vi tedas min! Lasu min trankvila, mi petas.

Teklo (al publiko). Jen kia kolera! Nu, ŝi bone kunligos mian karulon! (al ŝi). Mi vin petas, sinjorino, vi ne prenu alian kuiristinon; ja maljuna virino ĉiam estas pli konfidinda, ol iajuna senprudentulino,—vi mem scias...

Ljub. Ah, kiel ŝi estas tedema! Iru for... Mi tute ne bezonas kuiristinon...

Teklo (al publiko). A! Ŝi volas havi kuiriston! Vidu, kial (per ploranta voĉo). Dio vin juĝu! Via estas volo, mia kara sinjorino,—mi estas homo sensignifa, vi facile povas min ofendi,—sed vi neniam trovos la alian, tian kiel mi,—je Dio vi ne trovos!

Ljub. Sed pro kio vi tion-ĉi parolas al mi? Mi ja diris jam al vi, ke mi tute ne bezonas kuiristinon.

Teklo. Mi komprenas, sinjorino, mi komprenas! Sed ja kuiristo ĉiam ŝtelos, ja ili ĉiuj estas friponoj, mia sinjorino,—je Dio, friponoj! Mi ofte ilin vidadis en butiketoj kaj en aliaj vendejoj; mi ne fanfaronos; diversajn germanajn dolĉaĵojn kaj saŭcojn mi ne preparos, sed simplajn, ordinarajn manĝaĵojn mi bone faras. Al geedziĝo mi tian kukon al vi bakos, ke vi raviĝos.

Ljub. Kia geedziĝo? Ĉu vi freneziĝis?

Teklo. Pardonu, mia sinjorino, mi ne intence ĉion al vi elbabilis,—sed la afero ja estas bona, pro kio ni devas ĝin kaŝi? Ja se vi ne estus la fianĉino, vi al ni ne venus... Sendu al vi Dio pacon kaj amon; li havas bonegan animon,—vere, li estas iom forgesema, sed se vi pli ofte al li pri ĉio memorigos, li estos akurata,—vi ne dubu... Ah,—jen li revenis.

## 11. Samaj kaj Razgildjajev.

Razgil. (eniras kun paperoj, kiujn il ĵetas sur la tablon). Nu, glor' al Dio!—La paperojn mi havas, nun ĉio jam estas bone ordigita kaj mi... Dio mia!.. Vi estas tie ĉi!.. Kaj mi estas en ĥalato... Kion mi faris!.. Pardonu, mi petas,—mi estas tiel laŭhejme vestita... Vi honorigis min per via vizito... Vi estis tiel afabla kaj pardonema...

Ljub. Kaj li volas ankoraŭ amindumi, kvazaŭ

nenio okazis. Aŭskultu, sinjoro,—vi, fine, tute min senpacienĉigis, kaj mi mem decidis alveturi,<sup>8</sup> por konvinkiĝi, ĉu vi ne estas freneza... Se vi, efektive, estus malsana, vi ne forirus,—kaj se vi povas iradi, vi povus esti rilate min pli ĝentila.

Razgil. Vi, ŝajne, koleras? Do en kio mi estas kulpa?

Ljub. Kaj li ankoraŭ demandas!.. Rigardu, sinjoro, ĉu oni povas skribi al sinjorinoj tiajn leterojn? (Ŝi montras la leteron).

Razgil. Kiel, ĉu efektive mia delikata letero povis vin ofendi...

Ljub. Delikata letero! Sed ĉu vi, sinjoro, tra legis tion, kion vi skribis al mi?

Razgil. Pardonu, kiel malbone vi opinias pri mi!

Ljub. Do legu, sinjoro, legu,—se vi ne havas kutimon pensi pri tio, kion vi faras.

Razgil. Permesu, mi vin ne komprenas... Kion mi vidas!!! Tiu ĉi letero tute ne estas por vi, je Dio, ne por vi, Mi ĝin skribis al la fakestro; li estas terura homo, li volas malpacigi min kun vi.—Dio scias, kion li rakontas al vi pri mi. vi lin ne konfidu.

Ljub. Sed tion ĉi vi skribis?

Razgil. Mi... jes... Sed mi ne al vi ĝin sendis... Ĉion tion ĉi Teklo faris (li disŝiras la leteron kaj ĵetas ĝin sur la plankon).

Teklo. Mi? Jen vi havas! ja vi mem ĝin donis al mi.

Razgil. Nu, for! iru la kuirejon... sed memoru: kiu ajn venus, diru, ke mi ne estas hejme.

Teklo. (forirante). Mi komprenas, mia sinjoro; ne ĝustatempa gasto estas pli malbona ol tataro.

Razgil. Dio mia! Kiel mi hontas, kiel ĉagrenas!.. Sidiĝu, mi petas... (Li donas al ŝi la seĝon kaj li mem sidiĝas sur ĝi). Malbenita fakestro!.. Pro kio li sendis al mi... kiam mi... Pro Dio, vi gardu vin de tiu ĉi homo, li estas neindiferenta al

vi: li hieraŭ al mi diris, ke li forprenos de mi vian amemon.

Ljub. Li estas por mi same abomena, kiel ankoraŭ... vi, sinjoro: sed nun ni parolas ne pri li. Post morgaŭ estas templimo, oni devas prezenti petskribon en senaton...

Razgil. Jes, mi scias, je Dio. mi scias...

Ljub. Vi scias, kaj ĝis nun vi ne povas prepari la petskribon!..

Razgil. (leviĝas). Pardonu, ĉio estas preta, kio necesas: sur insigna papero... Jen, bonvolu ekrigardi (li donas la paperon).

Ljub. Kio ĝi estas?—pri iaj lignoj?!

Razgil. Pri lignoj? Aĥ, Dio mia! Kvazaŭ min mem oni per ia trabo batis. Ĝi estas la afero de Sevrjugin,—kaj jen la via... Pardonu, mi ĉiuminute pensas pri vi kaj pro tio mi faras kaj diras ĉiam sensencaĵojn!..

Ljub. Mi dankas vin por komplemento.

Razgil. Ne, Mario Antonovna, mi ne tion volis diri, mi volis...

Ljub. Bonege, sinjoro, vi eĉ mian nomon ne memoras...

Razgil. Aĥ, diablo ĝin prenu! Mi volis diri Anno Egorovna! Ne koleru,—pro Dio, ne koleru... Jen estas la kopio de decido el Novurba juĝejo, kaj jen la petskribo en senaton, ĝi estas jam tute preta... nur du liniojn oni devas alskribi... Tion ĉi mi tuj finos... Via afero estas tute senriska... Sidiĝu, mi petas. Kaj vi nomas min distra, vi dubas en mi... Mi tuj pruvos al vi.. nur du vortojn kaj la afero estos finita... (skribas) jen ĝi estas, tute preta, jen... (anstataŭ sablo, verŝas sur la paperon la inkon)... Aĥ, diablo prenu!..

Ljub. Nu, kion ankoraŭ?

Razgil. Kion mi faris?! (ĵetas la sablujon) Malbenita sablujo!..

Ljub. Bonege, sinjoro, nur tio ĉi mankis!

Razgil. Ne maltrankviliĝu!.. Mi tuj elskrapos...



Ljub. Ho, barbaro! Ho, turmentisto!..

Razgil. Ne koleru, pro Dio; mi tuj ĉion de-  
nove transskribos, ja tie ĉi estas nur tri folioj.

(Aŭdigas sonorilo).

Ljub. Dio mia! iu venis!.. Se oni min trovos  
ĉi tie, en loĝejo de fraŭla viro...

Razgil. Ne maltrankviliĝu, mi ordonis neniam  
enlasi.

Teklo. (post kulisoj), Li ne estas hejme,—je  
Dio, li foriris!..

Fakestro. (ankaŭ) Vi mensogas, malsaĝulino!  
Li estas hejme, enlasu min!..

Razgil. Aĥ, tio ĉi estas la malbenita fakestro!

Ljub. (mallaŭte). Ne enlasu lin ĉi tien!

Razgil. Ne, ne! Pro nenio mi lin enlasos!

Fak. (post kulisoj) Osip Osipoviĉ, malfermu,  
tuj mem malfermu, alie estos malbone!

Ljub. Tss! Vi nenion al li respondu!

Fak. Malfermu mi diras!

Razgil. Mi ne estas hejme! Mi foriris en la  
oficejon!

Kune { Ljub. Kion vi faras!  
Razgil. Aĥ, malbenita fakestro!

Fak. A, bonege, bonege! Do se vi tuj al mi  
ne malfermos, mi alvokos la kortiston!! Mi forrom-  
pos la pordon, mi estas homo milita. kaj mi ne  
amas ŝerci!

Ljub. Ĉu mi ne povas ie min kaŝi?

Razgil. Jes, jes,—kaŝiĝu, mi petas—kaŝiĝu...  
Se li vin tie ĉi trovos. morgaŭ tuta nia oficejo  
pri ĝi ekscios! Eniru jen tien ĉi dekstren, en mian  
ĉambron.

Ljub. Pro Dio, forpelu lin de tie ĉi plej bal-  
daŭ... Dio mia! Kia turmento!.. (Ŝi iras dekstren).

Razgil. Estu trankvila, mi tuj... Ke li ne  
eniru iamaniere tien ĉi... (Li ŝlosas la pordon kaj  
la ŝlosilon kaŝas en la poŝon). Jen, tiel estas pli  
bone. (Li iras kaj malfermas la mezan pordon).

## 12. La samaj kaj fakestro.

Fak. Pardonu, s-ro Razgildjajev, kion vi faras!  
Je kio ĝi estas simila? Vi mokas!.. Ĉu vi frene-  
ziĝis? Mi venas al vi, kaj vi mem diras, ke vi ne  
estas hejme!.. Se mi persone devas iradi por invi-  
ti ĉiujn oficistojn, mi mem tiamaniere neniam es-  
tos hejme!..

Razgil. Kion vi volas? Vi kvazaŭ de ĉeno  
vin forŝiris!

Fak. Vin, efektive, oni devus alĉenigi. Kiel vi  
povis, kiel vi kuraĝis sendi al mi tian leteraĉon?  
Ŝe mi prezentus ĝin al la s-ro direktoro, ĉu vi  
scias, kion vi ricevus por ĉi-tio? Mi estas homo mi-  
lita, kaj kio rilatas al la honoro, vi min pardonu,  
mi ŝerci ne amas!

Razgil. Kion ĝi signifas? Pri kiu letero vi  
parolas?

Fak. Pri tiu, kiun vi sendis al mi kun gardi-  
sto Fadejev; jen ĝi estas, kaj mi humile vin pe-  
tas klarigi... «Mi vin amas, adoras»... Kio ĝi es-  
tas? Kion ĝi signifas?

Razgil. Aĥ, diablo ĝin prenul!

Fak. «Unu via anĝela ekrigardo, kaj mi estos  
plej feliĉa homo en la tuta mondo».. Pardonu,  
ŝed kion vi pensas pri mi?

Razgil. Ĝi estas tute ne por vi!.. Ĉu mi po-  
vus skribi al vi tian sensencaĵon? Jen estas via  
letero, prenu ĝin, legu!.. (Li montras la disŝiritan  
leteron).

Fak. Kio? kio? Kiel vi kuraĝas?! Kiel vi po-  
vas.. Vi forgesas, kun kiu vi parolas! Mi kompre-  
nas, mi divenas, al kiu vi skribis tiujn ĉi delika-  
taĵojn: vi freneziĝas pro alveturinta vidvineto, kiu  
loĝas nun ĉi tie ne malproksime de vi... Sed trank-  
viliĝu: vi ŝin ne ekvidos, kiel viajn proprajn  
orelojn..

Razgil. Jes, aparte se vi al ŝi mensogos kaj  
kalumnios... Ho, ŝi tute egale, eĉ sen mi, neniam

je vi edziniĝus... Nu, kian salajron vi havas. kian rangon? Kaj kio estas vi mem? Sensenca homo, kaj nenio plu.

F a k. Nu, kiu ajn mi estus, sed vi pli bone forgesu pri via vidvineto!

R a z g i l. Kaj ĉu vi intencas min anstataŭi?

F a k. Sed kial ne? Mi en la kapo kaj en la poŝo havas pli multe, ol vi,—kaj mi mem laŭ aspekto estas sendube pli bela, ol vi! Kaj vi ankoraŭ komencis klopodi pri ŝia afero? Nu, ĉu vi povas klopodi pri malpropraj aferoj, se eĉ en la viaj propraj mem diablo povas piedon rompi...

R a z g i l. Kompreneble, ĉu ni povas kompari nin kun vi; vi scias, kiel aranĝi viajn aferojn,—vi bone scias montri al estraro elspezojn kaj kaŝi en la poŝon enspezojn...

F a k. Kiel vi kuraĝas paroli tiajn vortojn?.. Mi tion ĉi ne forlasos... mi... mi.., ĉion raportos al lia generala moŝto.

R a z g i l. Jes, mi scias, ke vi nenion alian faras,—krom nur kalumnias al estraro...

F a k. Jen kiel!.. Nu, pri tio ĉi ni poste interparolos, kaj nun vi iru kaj klarigu viajn hodiaŭajn artifaĵojn!.. Vi, sinjoro, malhonoras la tutan oficejon... Kiel pri ni opinios lia generala moŝto? Veni al li tiel frue, kaj aperi ne en sia aspekto...

R a z g i l. Kio? kio? Kiel ne en sia aspekto?

F a k. Jes, vi ja estis en la uniformo de alia ministrejo!.. Ja ĝi estas krimo!.. Liberpensoj!.. Klara signo de senorda servo!.. Vi kuraĝis vekti tian zorgeman estron, maltrankviligi lian ripozon post tagaj laboroj! Ĉu vi scias, ke lia generala moŝto hieraŭ bonvolis ekdormi nur je la dua horo,—kaj vi lin vekis je la oka!.. Li antaŭ kelkaj minutoj alveturis oficejon, kvazaŭ sovaĝa besto! Apenaŭ li supreniris la ŝtuparon, li jam bonvolis min ekin-sulti por nenio,—kaj tio ĉi estas via kulpo...

Alia fakestron li tiel insultis pro vi, ke gardu nin Dio!.. Kia, li diris, estas senordo en via fako!..

Kiaj oficistoj! Kial vi povas pacienci tiajn frenezulojn? Filipino Filipoviĉ tuj sendis min, ke mi vin voku, li ordonis venigi vin vivan aŭ mortan!.. Mi estas homo milita, mi scias miajn devojn... Do bonvolu vesti vian uniformon, alie vi, povas okazi, en ĥalato venos en la oficejon!..

R a z g i l. (vestas la uniformon) Malbenita uniformo!.. Kiamaniere hieraŭ l'ucēglazov ne rimarkis,—kiel hodiaŭ Teklo ne vidis?.. Aŭskultu, sinjoro Meljuzga, vi ne foriros de tie-ĉi?

F a k. Sen vi mi eĉ unu paŝon ne faros, mires-tos tie ĉi ĝis vespero mem.

R a z g i l. Nu, kion fari. Ni iru; sed vi ne imagu, ke mi vin ektimis, mi tion ĉi faras laŭ alia kaŭzo.

F a k. Por mi ĝi estas tute egala, sed vi devas iri kune kun mi.

R a z g i l. Vi povas timigi viajn gardistojn, sed mi vin ne timas... Mi iras kun vi nur pro tio ke.. ke Anno Egorovna min petas...

F a k. Nu, tie estraro juĝos: ĉu Anno Egorovna aŭ Grigorio Sidoroviĉ,—nur vi bonvolu iri...

R a z g i l. Nu, ni iru, bone, ni iru (Jli foriras).

### 13. Teklo kaj Ljubeckaja (kaŝita)

Teklo. Kiel ili tie ĉi kriegis! Nu, fakestro! Kia li estas laŭtvoĉa!.. La mia estas kvazaŭ malseka kokino, sed li, malgraŭ ke li estas malgranda, kvazaŭ ia koko kriis!.. Sed kie nia birdeto malaperis? Ŝi, ŝajne, ne eliris de tie ĉi... (frapo) A! jen kiel!.. Li ŝin en kaĝon kaŝis!

Lj u b. (post kulisoj) Aŭskultu, aŭskultu!

Teklo. Kion vi ordonas, sinjorino?

Lj u b. Malfermu la pordon!..

Teklo. Tuj, mia kara... (ĉe la pordo) Sed kial ĝi ne malfermiĝas?... Aĥ, sankta Dio,—ja la pordo estas ŝlosita!..

Lj u b. Do malfermu.



Teklo. Sed per kio, kara sinjorino? Mi ne havas la ŝlosilon.

Ljub. Dio mia! li min malliberigis! Vi rigardu: ĉu ne falis la ŝlosilo sur la p'ankon.

Teklo. Ne, sinjorino, ĝi nenie estas vidata; kredeble li prenis ĝin kun si... Jen, efektive, estas bravulo; li malliberigis la fianĉinon antaŭ la edziĝo!

Ljub. Forŝovu la riglilojn.

Teklo. La rigliloj tie ĉi ne estas, sinjorino, ili estas interne.

Ljub. Do forrompu la pordon.

Teklo. Kion vi diras?

Ljub. Forrompu la pordon, mi diras.

Teklo. Sed per kio, sinjorino? Mi nenian instrumenton havas... Venigi seruriston, aŭ voki la kortiston? Sed estas malbone: mi faros la tumulton, kaj oni ion nekonvenan pensos!.. Pli bone atendu, kara sinjorino; li al tagmanĝo revenos, se io lin ne malhelpos.

#### 14. La samaj kaj Gutorin (kun libro).

Gutor. Nu, karulo, mi rapidis al vi, kvazaŭ... Ehe! Li jam malaperis,—kie li estas?

Teklo. Li forveturis kun la fakestro en sian oficejon.

Gutor. Forveturis! jen sensenca homo,—kaj mi intence pro li forlasis miajn aferojn... (al Teklo, kiu staras ĉe la pordo dekstre kaj rigardas tra la fendon) Sed kion vi faras tie?

Teklo (mallaŭte, ŝvingante per la mano) Ree li artifikaĉis!

Gut. Kion?

Teklo. (duonvoĉe) La fianĉinon li enŝlosis.

Gut. Kion vi diras? Kian fianĉinon?

Teklo. Vidu, la fakestro venis, kaj al ŝi farigis honte, ŝi volis sin kaŝi,—kaj li ŝin enŝlosis kaj la ŝlosilon forportis kun si.

Gut. Ah, frenezulo!

Ljub. (post kulisoj) Kiu vi estas—tute egale, sed, sinjoro, malfermu la pordon...

Gutor. Ŝi sendube estas tiu vidvineto, pri kiu li parolis... Pardonu min, sinjorino,—kvankam mi ne havas la honoron vin koni, sed estu certa en mia modesteco... (al Teklo) Alportu martelon! (Teklo foriras kaj revenas kun la martelo) Trankviliĝu sinjorino (li malfermas).

#### 15. La samaj kaj Ljubeckaja.

Gut. Kiun mi vidas! Anno Egorovna!

Ljub. Ivan Nikanoriĉ!... Ah, kiel estas malbone al mi!.. (Ŝi falas eu sveno sur la seĝon).

Teklo. Jen vi havas! Ŝi estas konata kun li! Nu, forflugos nun kolombino de mia kolombo!

Gut. Foriru, Teklinjo,—lasu nin, vi tie ĉi nenion havas fari.

Teklo. Mi vidas, mia sinjoro, mi vidas... Kompreneble, mi devas foriri, (Ŝi foriras).

Gut. Ŝi, ŝajne, rekonciĝas... Kiel vi sentas vin, Anno Egorovna?

Ljub. Dio mia!.. Kie mi estas? Kion vi pensas pri mi!..

Gutor. Ho, mia sinjorino,—pardonu, ja mi bone konas mian frenezan amikon!.. Sed mi neniel povas kompreni, kiamaniere vi estas tie ĉi, ĉe li!.. Razgildjajev iris al mi, ke li klopodas pri la afero de ia vidvino... kaj kvankam li ne nomis ŝin... sed ĉu efektive... vi...

Ljub. Jes mi; li diris pri mi.

Gut. Kiel? ĉu vi?..

Ljub. Jam antaŭ du jaroj mi estas vidvino.

Gut. Ĉu efektive!? Kia feliĉo!..

Ljub. Kiel, sinjoro?!

Gut. Ne, ne,—pardonu!.. «Kia malfeliĉo», mi volis diri... Dio mia! Nun mi mem estas kvazaŭ Razgildjajev... Mi nenion komprenas... mi tute konfuziĝis!.. Li rakontis al mi, ke vi jam du mo-

natojn estas tie-ĉi, kaj mi nenie renkontiĝis kun vi... Sed en kia malfeliĉa minuto vi povis komisi al li vian aferon?

Ljub. En ĉio estas kulpa mia onklino: ŝi rekomendis lin al mi, kiel honestan, spertan homon... Li certigis nin, ke nia afero estas tute bona, justa,—kaj rigardu.. (Ŝi montras al li la papecon, malpurigitan per inko, kiun restigis Razgildjajev sur la tablo).

Gut. Nu, jes!.. Mi bone vidas lian laboron!

Ljub. Dio mia! kiel mi estas malfeliĉa!.. Mi nenion konas tie-ĉi, mi ne scias, al kiu min turni... Se post morgaŭ ni ne prezentos nian petskribon en senaton, mi malgajnos la aferon.

Gut. Vi forgesas viajn malnovajn amikojn, Anno Egorovna! la amikojn, kiuj... Sed ĉu efektive mi devas ree disiĝi kun vi? Ĉu efektive ankaŭ tiu-ĉi amiko forprenos de mi miajn antaŭajn rajtojn?

Ljub. Ah, kion vi diras!.. Mi neniam estos lia edzino!.. Tion-ĉi volis aranĝi nur mia onklino... (Ŝi donas al li la paperojn) Jen, prenu!

Gutor. (kisante ŝian manon) Ho! mi estas plej feliĉa homo en la tuta mondo!..

## 16. La samaj, Razgildjajev kaj Teklo.

Razgil. Kie ŝi estas? Teklo, Teklo! Venu ĉi tien,—serĉu, serĉu pli rapide!..

Teklo. Kiun, aŭ kion? Kion serĉi?

Razgil. Kien vi metis, malsaĝulino, la aferon de komercisto Sevrjugin? Kie ĝi estas?

Teklo. Ah, mia sinjoro, ĉu mi ĝin povas scii?..

Razgil. Vi nenion vidas, nenion rimarkas!.. Diablo... A! mia amiko, vi estas tie-ĉi, vi revenis... Mi estas tre ĝoja, mi... Dio mia! Kiun mi vidas? Vi min honorigis per via vizito!..

Ljub. Bonege!.. Li ree komencas antaŭan scenon...

Razgil. Permesu al mi rekomendi al vi mian amikon... mian plej veran amikon.. Kia estas via nomo?

Gutor. Estas tre interese!.. Li eĉ ne intencas peti pardonon!..

Razgil. Peti pardonon? pri kio peti pardonon?

Gut. Bone, tre bone! kaj li ankoraŭ diras, ke li ĉion memoras!..

Razgil. Sed kion mi forgesis!

Gutor. Kion forgesis!.. Vi ja enŝlosis Annon Egorovna, kaj la ŝlosilon vi forportis.

Razgil. (serĉas en la poŝo) Mi enŝlosis?! Mi?... Kion vi diras?... Ah, kia malsaĝulo mi estas!.. Ja efektive... jen ĝi estas... Pardonu, mi petas... Mi tuj al vi malfermos... (Li kuras, por malfermi la pordon).

Gut. Ha, ha, ha!.. Nu, tio-ĉi estas jam plej bona!.. Haltu, haltu,—ne maltrankviliĝu. Vi pli bone rakontu, kion vi ricevis en la oficejo?

Razgil. Kion? Oni min insultis en ĉeesto de ĉiuj oficistoj... Cetere, vi, pro Dio, ne maltrankviliĝu pri via afero; mi ĝin finos, nepre finos.

Gut. Nu, vi jam ne besonas pri ĝi klopodi: Anno Egorovna transdonis al mi sian aferon.

Razgil. Ĉu efektive? Jen estas bonege! Sekve vi kun li jam konatiĝis!

Ljub. Jes, mi konatiĝis.

Gutor. Jes, ankoraŭ antaŭ dek jaroj pli frue, ol kun vi. La sinjorino estas tiu sama persono, pri kiu mi al vi rakontis.

Razgil. Ah, jes, jes! Kiun de vi forprenis via amiko? Mi memoras... Vi vane, sinjorino, ne fariĝis lia edzino; li ja estas bonega homo... Li antaŭ nelonge tiel malĝojis pri vi... Mi, sinjorino, kuraĝas peti vin pri li...

Gut. Ne maltrankviliĝu, mia amiko... povas esti, ke la afero iel aranĝigos...

Razgil. Ĉu efektive? Nu, mi estas tre ĝoja.

Tamen... atendu... pro kio mi ĝojas?.. ja tio-ĉi signifas, ke nun jam vi forprenas ŝin de mi?

G u t o r. Mi ja diris al vi, kiaj estas ĉiuj sinceraj amikoj!.,

R a z g i l. (kun ekspiro) Tute vere!. Do kion tio-ĉi signifas? Tie, en la ofiĉejo, oni min insultis, tie-ĉi oni forprenis de mi la fianĉinon,—kaj ĉio tio-ĉi okazis dank'al tiu-ĉi malbenita uniformo!..

Nu, tamen, juĝu vin Dio, kaj mi ne havas tempon... Adiaŭ, mi devas iri en la oficejon... (Li kuras al la pordo).

G u t o r. Haltu, haltu!.. (montrante la publikon) Ĉu vi forgesis?..

R a z g i l. Jes, jes,—mi dankas, ke vi min memorigis... (al la publiko)

Se iu, kiel mi, klopodas,  
Nenion bonan trovas li;  
Sed la aŭtoro nepre volas,  
Ke mi klopodu nun pri li...  
Per mi vin la aŭtoro petis...  
Pri kio, ne klarigos mi...  
Sed la aplaŭdojn mi profetis...  
Ĉu ilin nun ekaŭdos li?